der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

23. Jahrgang Nr. 146 (6/1987) ISSN 001 4-0619 30 Pf

Fritz Wollenberg

La naskiĝa dokumento de Esperanto

„... tiu Unua Libro triobla ĝermo de nia lingvo, de nia movado kaj de nia literaturo, ..."

D-ro Andreo Albault 1962[1])

La tradicikonscia Esperanto-modvado travivis la inaŭguron de la 72-a Universala Kongreso de Esperanto kiel kulminan aranĝon de la jubilea jaro ĝuste en tiu tago, kiam centjariĝis la apero de la Unua Libro de Esperanto ĝuste en tiu urbo, kie aperis tiu ĉi naskiĝa dokumento de Esperanto, en la pola ĉefurbo Varsovio.[2]) Okazis la 26an de julio 1887, ke la juna 27-jara kuracisto D-ro Lazar Ludvik Zamenhof publikigis sian projekton de „Internacia Lingvo", jenan planlingvan projekton, kiu evoluis al la sola hodiaŭ mondvaste funkcianta internacia planlingvo. La unuan eldonon en la rusa lingvo ankoraŭ en la sama jaro sekvis pola, franca kaj germana eldonoj[3])

Ĉu tiu ĉi naskiĝa dokumento de Esperanto ankoraŭ povas diri ion al ni, cent jarojn poste vivantoj?

Gaston Waringhien emfazas, ke la unuaj tri verkoj en Esperanto estas gravegaj „pro la kvanto de estonteco, kiun ili entenas."[4]) Speciale pri la Unua Libro li skribis: „Oni povas diri, ke tiuj paĝoj tenas en si kvazaŭ ĝerme lian (la Zamenhofan — suplemento de la aŭtoro) tutan estontan politikon."[5]) Vere, la Unua Libro ne nur enhavas lernolibron de la nova lingvo kaj folion kun vortaro, ĝi krome enhavas la unuajn erojn de la Esperanto-literaturo originala kaj traduka (Poemoj de Zamenhof: „Mia penso", „Ho mia kor'" kaj traduko el Heine); sed ĝi ankaŭ enhavas en la antaŭparolo la koncepton de Zamenhof pri la ellaborado de internacia lingvo, pri la principoj de ĝia strukturo, pri ĝia ebla funkcio en la socia vivo, la maniero de ĝia disvastigo kaj enkonduko en uzadon, pri ĝia evoluigo.[6]) La konatiĝo kun tiu ĉi koncepto prezentita de Zamenhof kune kun la lingvoprojekto malkaŝas al la hodiaŭa leganto gravajn fontojn de la sukcesplena evoluo de Esperanto kaj konsciigas la rolon de Zamenhof kiel iniciatinto de nia lingvo, de nia literaturo kaj de nia movado. Videbliĝas en tiu ĉi grava verko rezultoj de la spirita evoluo de Zamenhof ĝis 1887, kiuj estis elirpunkto de plua spirita evoluo.

1887 — cezuro en la vivo de Zamenhof

„Al sinjoro d-ro L. Zamenhof por d-ro Esperanto en Varsovio" — tiun adreson de la aŭtoro oni trovas sur la lasta paĝo de la Unua Libro.[7]) Kiu estis tiu D-ro Zamenhof, kiu laŭ nia scio malkaŝis sin per la pseŭdonimo D-ro Esperanto?

La juna doktoro finis la mendicinan studadon, komencitan de 1879 ĝis 1881 en Moskvo, en 1885 ĉe la Varsovia Universitato. Nun jam praktikinta en kelkaj urboj kaj specialiĝinta okulkuracisto li provis sekurigi sian profesian pozicion en Varsovio. Ankoraŭ li ne

Dr. ESPERANTO.

INTERNATIONALE SPRACHE.

VORREDE

UND

VOLLSTÄNDIGES LEHRBUCH.

por German o j

Damit eine Sprache zur *Weltsprache* werde, genügt es nicht sie so zu *benennen*.

Preis 40 Pf.

WARSCHAU.

Zu haben in der Buchhandlung von Gebethner et Wolff

1887.

povis antaŭvidi, ke daŭros 14 jarojn de malfacilaj penoj antaŭ la li sukcesos akiri de post 1901 en la juda kvartalo de Varsovio certan pozicion kiel okulkuracisto de la malriĉa juda loĝantaro. En 1887 li ankoraŭ sufiĉe optimisme staris je la komenco de sia penplena profesia vivo. „Al la afero, kiun mi nun proponas al la leganta publiko, mi oferis miajn plej bonajn jarojn, . . ." [8]) Tiuj vortoj aludas la grandegan laboron faritan dum junecaj jaroj por krei la bazon de Esperanto. En sia konata letero al Borovko Zamenhof mem donas imagon pri tiu laboro. Li nomas la periodon ĝis 1887 la „historion de la naskiĝo de la lingvo". [9]) Laŭ lia memoro tiu periodo komenciĝis per infanaj revoj, kontinuis per pripensado kaj elprovo de diversaj eblecoj de komuna lingvo por diverslingvanoj — kun entuziasmiĝo por la revivigo de antikva lingvo — per provoj krei tute elpensitan lingvon kaj fine kulminis en la ellaborado de „artefarita lingvo" surbaze de naciaj lingvoj. Do la historio de la naskiĝo komenciĝis en Białystok, kie Zamenhof en 1859 naskiĝis kaj kie li kiel infano jam estis konfrontita kun la diverslingvaneco. Tiu periodo pludaŭris en Varsovio, kien la familio Zamenhof en 1873 transloĝiĝis kaj kie li daŭrigis la viziton de la gimnazio. Emociplene li priskribis en la jam menciita letero la feston kun la samklasanoj okaze de la „sanktigo" de la „Lingwe Universala" fine de sia gimnazia tempo en 1878 kaj la sekvan „malkaŝan laboron" de eksperimentado kaj elprovado. Li mencias dujaran serĉadon de eldonisto. La Unua Libro prezentas la rezultojn de tiu multjara malfacila laboro, kiu kondukis la junulon ne estanta lingvosciencisto sed laboranta kun la esploremo, la obstineco kaj precizeco de la sciencisto al la sukceso, al la malkovro de principoj de la strukturo de internacia planlingvo kaj al la kreo de projekto surbaze de tiuj principoj. La publikigo de la lingvoprojekto ne signifas la finon de la lingvokrea laboro de Zamenhof, ĝi nur signas la komencon de nova etapo post kreo de la lingvobazo. Komenciĝis tempo de publika elprovado, tempo de la kolektiva ellaborado kaj evoluigo de la lingvo, tempo de disvastigo kaj aplikado. Por la iniciatinto komenciĝis tempo de publika agado per kaj por Esperanto. Pri la signifoplena paŝo Zamenhof poste skribis: „Fine, post longaj klopodoj, mi prosperis mem eldoni mian unuan broŝuron en Julio de la jaro 1887. Mi estis tre ekscitita antaŭ tio ĉi; mi sentis, ke mi staras antaŭ Rubikono kaj ke de la tago, kiam aperos mia broŝuro, mi jam ne havos la eblon reiri; mi sciis, kia sorto atendas kuraciston, kiu dependas de la publiko, se tiu ĉi publiko vidas en li fantaziulon, homon, kiu sin okupas je ‚flankaj aferoj'; mi sentis, ke mi metas sur la karton tutan estontan trankvilecon kaj ekzistadon mian kaj de mia familio; sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian korpon kaj sangon kaj . . . mi transiris Rubikonon." [10])

Transirante la Rubikonon la juna kuracisto kaj lingvokreanto ankaŭ trapasas gravajn ŝanĝojn de sia politika pensado.

Varsovio tiutempe estis la ĉefurbo de Pollando, kiu de post 1815 estis ligita kun Rusio kaj per tio al la socia kaj nacia subpremo de la rusa carismo. De la parto edukita en la tradicio de la juda klerisma movado Haskala kaj en lojaleco al la rusa regado, la junulo spertis la sekvojn de la carisma subprema politiko kaj la de ĝi incititaj konfliktoj inter la diversnacianoj, kiuj plej kruele trafis la judan loĝantaron. Kune kun aliaj influoj tio kaŭzis kontraŭdirojn en la pensado de Zamenhof, al kies solvo li dumvive strebis. La studento, reveninta el Moskvo, travivis en 1881 kontraŭjudan progromon en Varsovio. En la jaroj poste li partoprenis la diskutadon pri elmigrado de la judoj; kelkajn jarojn li partoprenis cionisman agadon. [11]) Tiu aktivado finiĝis kun la studenta tempo. Poste la influoj de Haskala kaj la influoj de la Pola Pozitivismo superis. Kun propra koncepto li elpaŝis en la jaro 1901. En la tiam ne publikigita „Alvoko al la juda intelektularo" li disputas kun la cionismo kaj prezentas sian „Hilelismon", la rezulton de la pripensado, kiamaniere la juddevenaj loĝantoj samrajte kaj digne povas kunvivi kun

ĉiuj alidevenaj loĝantoj en la lando..[12] Evidente ankaŭ evoluis kaj konkretiĝis jam ĝis 1887 la lingvopolitika koncepto de Zamenhof. Ankoraŭ en la jaro 1882 la universitata studento nomas sian lingvon „lingvo universala". La doktoro en la Unua Libro prezentas „Lingvon Internacian". Tiu ĉi ŝanĝigo de la lingvonomo esprimas gravajn lingvopolitikajn ekkonojn de Zamenhof. Forta influo de Komensky ne nur tiurilate ne estas ignorebla. En la tradicio de Komensky Zamenhof unue uzis la nomon „universala lingvo", sed por pli bone esprimi sian koncepton pri la funkcio de la lingvo kiel rimedo de internacia komunikado, kiel dua lingvo apud la gepatra, li publikigis la projekton sub la nomo „Lingvo Internacia". Komensky skribis, ke „provizore estas necese rekomendi., ke nacioj konservu kaj kulturu ankaŭ siajn proprajn lingvojn ..." [13] Zamenhof emfazis en la Unua Libro, ke tiam ambaŭ lingvoj, ankaŭ la gepatra povus „pli ellaboriĝadi kaj perfektiĝadi kaj starus pli alte, ol ĉiu el ili starus nun." [14] Poste Zamenhof pli vaste ellaboris la penson pri la defendo de la libera evoluo de ĉiuj naciaj lingvoj kaj pravigis ĝin en sia „Homaranismo". [15]

La jaro 1887 ankoraŭ pro alia evento estas grava cezuro en la vivo de Zamenhof. La 30an de marto en 1887 li fianĉiĝis kaj la 9an de aŭgusto sekvis la edziĝo kun la 23-jara filino de fabrikisto el Kovno, Klara Zilbernik. Tiu ĉi evento nedisigeble estas ligita kun la apero de la naskiĝa dokumento de Espranto. Zamenhof poste rememoros: „Al mia fianĉino mi klarigis la tutan esencon de mia ideo kaj la planon de mia estonta agado. Kaj mi demandis ŝin, ĉu ŝi volas ligi kun mi sian sorton. Ŝi ne sole tute konsentis, sed ŝi donis al mia tuta dispono la sumon da mono, kiun ŝi posedis, kaj tio ĉi donis al mi la eblon, post longa vana serĉado de eldonanto, fine eldoni mem ... miajn unuajn kvar broŝurojn ... [16]

Klara Zilbernik por ŝia edzo ne nur estiĝis fidela vivkamaradino, sed ankaŭ „ĉiama kunlaboranto kaj helpanto de la edzo" kaj „ofte plenumis liajn administrajn kaj sekretariajn taskojn". [17]

Fontoj de sukceso kaj fontoj de kontraŭdiroj

„Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia." Tiu konstato sur la frontpaĝo de la Unua Libro anoncas la pretendon de la aŭtoro esti solvinta la problemon de „la kreo kaj enkonduko en uzadon de racia lingvo internacia". Li detale traktas: „El ĉiuj projektoj, kiuj en diversaj tempoj estis proponitaj al la mondo, ofte sub la laŭta per nenio pravigita nomo de ‚lingvo tutmonda', neniu solvis pli ol unu el la diritaj problemoj, kaj eĉ tiun ĉi nur parte." [19]) Kio donis al Zamenhof la optimismon kaj la certecon, ke ĝuste tiu ĉi lingvoprojekto sukcesplene estos evoluigata kaj aplikata kiel internacia lingvo? Ĝis tiam ja jam ekzistis sufiĉe multaj aliaj projektoj [20] kaj unu el ili — Volapük — publikigita en la jaro 1879, komenciĝis evolui al uzata lingvo. Ĝis la jaro 1887 ĝi estis disvastigita jam relative sukcese. La gazeto „Le Volapük" ekzemple en 1887 estis sendita al 13 000 Volapükanoj. La kulmina disvastiĝo ankoraŭ ne estis atingita. [21] Tamen Zamenhof kuraĝis antaŭdiri ĝian subiron.

Kiel ĉefan bazon de la sukceso de internacia planlingvo kaj sekve por la sukceso de Esperanto Zamenhof karakterizis la solvon de jenaj problemoj: 1. „ke la lingvo estu eksterordinare facila", 2. „ke la lingvo jam de la komenco, mem dank' al sia propra konstruo povu servi kiel efektiva rimedo por internaciaj komunikiĝoj.", 3. „Trovi rimedojn por venki la indiferentecon de la mondo kaj igi ĝin kiel eble plej baldaŭ kaj amase komenci uzadi la proponatan lingvon kiel lingvon vivan, ..." Zamenhof detale priskribas la strukturon de la nova lingvo kaj motivigas la taŭgecon speciale por la internacia komunikado pro ĝia strukturo, pro ĝia plisimpligita gramatiko en la senco de la ekzistantaj lingvoj, ĝia klareco, precizeco kaj flekseblec o, ĝia produktiva vortfarado kaj aglutina karaktero, pro la uzado de vortoj, uzataj en la plej multaj eŭropaj lingvoj. Fakte la konstruo de la lingvo elproviĝis ĝis hodiaŭ. Ĝuste pro tiu ĉi strukturo oni hodiaŭ rekomendas la lingvon kiel lernobjekton en lernejoj pro ĝia prope-

deŭtika efiko por la lernado de aliaj fremdlingvoj [23]) kaj konstatas la specialan taŭgecon por ellaborado de baza lingvo por maŝina tradukado. [24]) Zamenhof konsciis ne nur pri la evolukapableco de sia projekto, sed ankaŭ pri neceso de plua evoluigo. En la Unua Libro li ankoraŭ iomete neklare rigardas sian projekton ne kiel „ion perfektan, pli altan kaj pli bonan ol kiu nenio plu povas esti". Li instigis publikan diskutadon pri la lingvo por la daŭro de unu jaro kaj aldonis, ke „la lingvo ankaŭ en estonteco ne estas fermita por ĉiuspecaj plibonigoj, nur kun tiu diferenco, ke tiam la rajto ŝanĝi ne plu apartenos al mi, sed al aŭtoritata komune akceptita akademio de tiu ĉi lingvo." [25]) Tiujn pensojn pri evoluo kaj normigo li poste pluevoluigis. Jam en la Aldono al la Dua Libro (1888) li skribis: „... la lingvo internacia devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiaj estis ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj, kaj tiu formo, kiun mi donis al ĝi, tiu gramatiko, kiujn mi prezentis, devas esti sole fundamento, sur kiu estos ellaborata la efektiva lingvo internacia de l'estonteco." [26])

Drezen emfazis en sia skizo pri Zamenhof, ke „tiu ideo pri evoluo de la Lingvo Internacia .. .estis neniam de iu antaŭ Zamenhof esprimita." [27]) La devizo sur la dua paĝo de la Unua Libro jam anoncas tiun ideon kaj videbligas, ke la iniciatoro de la lingvo — tiel Zamenhof mem nomis sin [28] — komprenis la lingvon kiel socian fenomenon. Jen la devizo: „Internacia lingvo, simile al ĉiu nacia estas proprajo socia, kaj la aŭtoro por ĉiam forcedas ĉiujn personajn rajtojn je ĝi." Samtempe tiuj instigoj al kolektiva lingvoevoluigo kaj kreo de lingvonormiga institucio — en 1905 ĝi estis fondita — estas esprimo de la burĝaj demokrataj idealoj de Zamenhof, same lia koncepto pri la funkciado de la lingvo. Li ne nur rekomendas sian lingvon kiel „unu komune akceptita lingvo internacia, kiu prezentus egalrajtan proprajon de la tuta mondo ...", sed ankaŭ klarigas la „grandegan utilon", kiun ĝi alportus „almenaŭ en landoj kun diverslingva loĝantaro" kiel „lingvon regna kaj societa." [29])
Zamenhof mem ja vivis en tia lando, kaj la situacio tie instigis lin ellabori la lingvoprojekton kaj en tempo de intensigita rusiga politiko en la reĝlando Polio proponi la egalrajtan uzadon de planlingvo apud la gepatraj lingvoj. Li bezonis por la publikigo de la Unua Libro permeson de la cenzuro kaj ricevis ĝin, ĉar la rusa cenzuristo A. Lagadovski, amiko de lia patro, konsideris ĝin kiel „nedanĝera sensencaĵo". [30])

La permeson por eldoni gazeton li en 1888 ne atingis. Zamenhof ne nur atendis sukcesan disvastiĝon de Esperanto pro ĝia strukturo sed ankaŭ pro la idealoj, kiujn li ligis kun ĝia disvastiĝo. Ĝerme jam montriĝas la posta tiel nomata „interna ideo" de Esperanto. Li atendas, ke per la mondvasta internacia lingva komunikado kaj interkompreniĝo „la popoloj interproksimiĝus kiel unu familio". La ligo de la ideoj de paco kaj interkompreniĝo de la popoloj kun la disvastigo de Esperanto estas gravaj ĝis hodiaŭ. [31]) Kontraŭdirojn kaŭzis la idealisma absolutigo de la rolo de lingvo. „La diferenco de la lingvoj prezentas la esencon de la diferenco kaj reciproka malamikeco de la nacioj ..." „... la lingvo estas la ĉefa motoro de la civilizacio: ..." Tiuj frazoj el la antaŭparolo de la Unua Libro montras la limojn de Zamenhof, kiu per la ŝanĝo de la konscio opiniis solvi sociajn problemojn.

Ankaŭ la utilon de la internacia lingvo por scienco, por komerco ... sur ĉiuj kampoj li motivigas per tio, ke „ju pli alte staras la lingvo, des pli rapide progresas la popolo." [32]) Spite al liaj idealismaj pensoj la instigo tuj uzi Esperanton sur ĉiuj kampoj serve al interkompreniĝo kaj progreso de la popoloj estis grava orientigo. Pli realisme poste estiĝis liaj opinioj, ankaŭ tiuj pri la disvastigo de Esperanto. En la Unua Libro li alvokis al internacia voĉdonado kaj petis resendi la aldonitajn kartetojn kun la promeso: „Mi subskribi(n)ta, promesas ellerni la proponitan de d-ro Esperanto lingvon internacian, se estas montrita, ke dek milionoj (da) personoj donis publike tian saman promeson." [33]) La

spertoj poste kondukis lin al aliaj ekkonoj pri disvastigo kaj organizado de la Esperanto-movado, sed estis efikoriče, ke la Unua Libro estis tuj uzeblaj kiel lernolibro kaj estis tuj uzita tiele kaj ke la unuaj adeptoj kontaktiĝis kun la iniciatoro de la lingvo, kolektiĝis ĉirkaŭ li kaj ekuzis la lingvon.

Kulturu ni la bonajn tradiciojn

La heredaĵo de la hodiaŭa Esperanto-movado el la pasintaj 100 jaroj estas riča, varia kaj kontraŭdira. Se ni el ĝi nun elektas tiujn valoraĵojn, kiuj povas doni al nia movado orientigon en la hodiaŭa mondo, la Unua Libro de Esperanto ludas specialan rolon. Post 100 jaroj estas eble pritaksi, kiu orientigo, kiu sperto estiĝis fekunda kaj kiu ne taŭge elproviĝis en realeco; parte ja Zamenhof mem ŝanĝis laŭsperte siajn opiniojn aŭ precizigis ilin. Sendube Zamenhof en la Unua Libro donis orientigojn, kiuj bontradicie efikas ĝis hodiaŭ. Tamen, ankaŭ esperantistoj sin ligas al liaj kontraŭdiraj aŭ eraraj opinioj, kiel ekzemple al lia subtakso de la komplikeco de sociaj procezoj, de procezoj de la internacia komunikado. Elĉerpu ni el la Unua Libro la kvanton de estonteco, kiun ĝi ankaŭ hodiaŭ por ni enhavas. La libro dank' al la eldono de Ito Kanzi plentekste estas disponebla. En la „Fundamenta Krestomatio" kaj en la Originala Verkaro de L. L. Zamenhof de prof. Dietterle mankas parto de la teksto. Ito Kanzi klarigis: „mi prenis la unuan libron el la fundamenta krestomatio, la tria parto de la antaŭparolo ne troviĝas en la libro, tamen s-ro Lins afable bonvolis enĵeti tra mia fenestro la represon de s-ro Setälä, . . . [34]) la gramatikon mi prenis ankaŭ el la fundamenta kerstomatio, kvankam ĝi estas iel simpligita kaj modernigita ol la gramatikoj, kiuj troviĝas en la unuaj klasikaj eldonoj por diversaj nacioj . . ., la almetitan vortareton mi prenis el la unua libro por rusoj." Ito Kanzi informas, ke laŭ lia supozo Zamenhof esperantigis la Unuan Libron en 1902 aŭ 1903 kaj ke la traduko de la IIIa parto estas farita de Georgo Černohvostov. [35]

Literaturo kaj fontoj

1. D-ro Andreo Albault, Ĝenerala enkonduka notico, en: L. L. Zamenhof, Fundamento de Esperanto, naŭa eldono kun Enkondukoj, Notoj kaj Lingvaj Rimarkoj de D-ro A. Albault, Esperantaj Francaj Eldonoj, Marmandie, Francujo, 1963, p. 11
2. 72a Universala Kongreso de Esperanto — Varsovio, 25. VII. — 1. VIII. 1987, en: Heroldo de Esperanto, N-ro 1'1987
3. Z. Adam = Adam Zakrzewski, Historio de Esperanto 1887 —1912, Pola Esperanto-Asocio, Varsovio 1979 (Represo de la en 1915 aperinta verko), p. 10
4. Gaston Waringhien, 1887 kaj la sekvo, eseoj IV, Antverpeno, La Laguna, 1980, p. 110
5. Gaston Waringhien, 1887 kaj la sekvo, p. 117
6. Komparu: I. Širjaev, Unua Libro de Esperanto, en: Enciklopedio de Esperanto, I. volumo, redaktis L. Kökeny kaj V. Bleier, represo de la unua eldono, Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1979, p. 550
7. I. Širjaev, Unua Libro de Esperanto, en: Enciklopedio de Esperanto, . . ., p. 550
8. Antaŭparolo al la „Unua Libro", en: L. L. Zamenhof, Originala Verkaro, Antaŭparoloj, — gazetartikoloj — traktaĵoj — paroladoj — leteroj — poemoj kolektitaj kaj ordigitaj de D-ro Joh. Dietterle, Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, 1929, Esperanto-Fako (OV), p. 19
9. Eltiro el privata letero al S-ro B. (N. Borovko) presita kun permeso de ambaŭ korespondantoj (traduko el lingvo rusa V. G.), OV, p. 417
10. Eltiro el privata letero al S-ro B. . .,OV, p. 422
11. N. Z. Maimon, La kaŝita vivo de Zamenhof, Tokio 1978
12. L. Zamenhof, Provo de gramatiko de novjuda lingvo kaj alvoko al la juda intelektularo, Eld. de A. Holzhaus, 1982
13. J. A. Komenio: Selekto el Ĝenerala Konsulto pri la Rebonigo de la Homaj Aferoj, eldonis Čehoslovaka Akademio de Sciencoj, Prago 1954, citita en: Komenio kaj la internacia lingvo, Eldonis Čeha Esperanto-Asocio, Praha, 1974, Kompilis Oldřich Knichál, p. 13/14
14. Antaŭparolo al la „Unua Libro", OV, p. 18
15. Komparu: OV, p. 334
16. L. Zamenhof, Letero al Michaux, en Enciklopedio de Esperanto . . ., p. 580—581
17. E. Wiesenfeld, Zamenhof, Klara, en: Enciklopedio de Esperanto . . ., p. 579
18. I. Širjaev, Unua Libro de Esperanto, en: Enciklopedio de Esperanto . . ., p. 550
19. Antaŭparolo al la „Unua Libro", OV, p. 20
20. D. Blanke, Internationale Plansprachen — Eine Einführung, Akademie-Verlag, Berlin 1985, p. 67
21. D. Blanke, Internationale Plansprachen...., p. 212
22. Antaŭparolo al la „Unua Libro", OV, p. 20
23. T. Dahlenburg, Die internationale Plansprache Esperanto als Unterrichtsgegenstand ,en: der esperantist, n-ro 119 (3/1983)
24. Ralf Klingsieck, Sprach-Computer aus den Niederlanden, en: Die Weltbühne — Wochenschrift für Politik, Kunst und Wissenschaft, n-ro 22 (2. Juni 1987)
25. Ito Kanzi, Iam kompletigota plena verkaro de l. l. zamenhof, kajero 1, unuaj libroj por esperantistoj, eldonejo ludovikito, 1973, p. 31 (pvz, k. 1)

26. pvz, k. 1, p. 94
27. E. Drezen, Zamenhof, en: Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado; red. D. Blanke, eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1978, p. 150
28. pvz, k. 1, p. 52
29. Antaŭparolo al la „Unua Libro", OV, p. 17 — 19
30. A. Holzhaus, L. Zamenhof kaj cara cenzuro, en Scienca Revuo, Vol. 25, n-ro 4 (108), 20. 9. 1974, p. 179
31. D. Blanke, Pri la „interna ideo" de Esperanto, en: Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado, p. 188
32. Antaŭparolo al la „Unua Libro", OV, p. 18
33. Esperanto en perspektivo, faktoj kaj analizoj pri la Internacia lingvo, verkita de Ivo Lapenna, Ulrich Lins kaj Tazio Carlevaro, Universala Esperanto-Asocio, Centro de esploro kaj dokumentado pri la monda lingvo-problemo, London, Rotterdam, 1974, p. 414
34. „unua libro de esperanto", faksimile represita, eldono de s-ro Vilho Setälä, 1948
35. pvz, k. 1, p. 111 — 113

DE LA SOLENA INAŬGURO DE LA JUBILEA U. K. EN VARSOVIO:

FESTPAROLADO DE H. TONKIN

Karaj Gekolegoj!

Antaŭ cent jaroj, ĝuste en la hodiaŭa tago, en presejo apud nia nuna kongresejo, aperis malgranda libro. Ĝi nomiĝas, en la rusa lingvo, „Lingvo Internacia". Ĝi priskribis simplan, bazan projekton de lingvo por faciligi la internacian komunikadon. Ĝia aŭtoro kaŝis sin malantaŭ la nomo „Doktoro Esperanto".

Malmultaj estis la homoj, kiuj profetis korekte la estontecon de tiu libro. La presistoj, kiuj ĝin kompostis, kaj pasigis tra la presilo, apenaŭ povis scii, ke, cent jarojn poste, kolektiĝos en Varsovio sesmil homoj el sepdeko da landoj por festi la finfaron de tiu simpla preseja tasko. Malmultaj estis la homoj, eĉ inter tiuj, kiuj aĉetis la libron, kiuj povis ĝuste antaŭvidi, ke tiu eta kaj modesta broŝuro semos semon, kiu disbranĉiĝos en plenan kaj vivipovan lingvon, kiu etendiĝos en ĉiun angulon de la terglobo, kaj estos uzata por ĉiuj taskoj, ĉiuj funkcioj, por kiuj la homaj lingvoj estas uzataj.

Malmultaj estis la homoj, kiuj povis profiti la grandajn sanĝojn, la grandajn eventojn, kiuj trafos la mondon en tiu jarcento de tiam ĝis hodiaŭ. Eble la spirito de optimismo de 1887 profetus la aviadilon, la televidon, la spacvetruadon, la komputilon. Eble ĝi profetus la grandajn gajnojn kontraŭ malsano kaj malriĉo, kontraŭ analfabeteco, kontraŭ malsato. kiujn registris nia jarcento. Eble ĝi povos antaŭvidi la konsciiĝon pri la homaj rajtoj, pri la rajtoj de virinoj, pri la rajto al demokrata partopreno en la socio, kiuj en nia epoko estis kodigitaj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj aliaj dokumentoj.

Eble ĝi povos antaŭvidi la kreon de la Ligo de Nacioj kaj poste la fondon de Unuiĝintaj Nacioj, ĉar ja en tiu epoko la sopiro al supernaciaj organizaĵoj, kiuj helpu la naciojn vivi en paco, estis granda.

Sed ĉu tiuj legantoj de la Unua Libro, kaj tiuj laboristoj, kiuj ĝin presis, povus scii, ke interne de tridek jaroj tuta Eŭropo plonĝos en la nokton de la plej granda milito, kiun iam ajn spertis la homaro? Ĉu ili imagus, ke ĉiuj tiuj eltrovoj de la scienco kaj la tekniko, kiuj levos la vivnivelon de la homoj, faciligos al ili la ĉiutagan vivon, pligrandigos ilian vivosperton — ĉu ili imagus, ke ili ĉiuj havos ankaŭ sian malluman flankon, kaj ke la brila tekniko kiu alportos vivon ankaŭ portos morton? La sensencan detruon de tiu unua mondmilito ni ŝuldas al la teknika progreso, per kiu unu nacio povis ĵeti kontraŭ alia armilojn neniam antaŭe eltrovitajn. Tiu brila progreso, kiun ili tiel admiris, detruis Dresden, detruis Coventry, kaj en fina paroksimo de neniismo, detruis Hirošimon. Tiu brila teknika progreso forbuĉas hodiaŭ grandan parton de la fruktoj de la ekonomio de la diversaj landoj en la formo de armiloj. Kaj dum la grandaj potencoj provizadas sin per atomarmiloj ,la tria mondo aĉetas pli simplajn armilojn je egala kosto al iliaj malbrilaj ekonomioj. Senprecedenca estas la nombro da lokaj militoj, kiuj hodiaŭ makulas la terglobon. Senprecedence multnombraj estas la rifuĝantoj de tiuj militoj.

Kaj la tekniko, kiu faris la tankojn kaj la militaviadilojn ,kiu faris la atombombojn kaj la militraketojn, estis tiu sama tekniko, kiu eltrovis novajn me-

todojn por persekuti la homojn pro la raso al kiu ili apartenas, la religio, kiun ili kredas, la lingvo, kiun ili parolas. Temas pri la sama tekniko, kiu inventas la gasejojn kaj la fornojn, kiujn neniu homo, tie ĉi en Varsovio kunvenanta, por festi la centjariĝon de Esperanto, povas plene forgesi.
Ĉu la legantoj de tiu Unua Libro povus antaŭvidi, ke la familio de ĝia aŭtoro malaperos preskaŭ sen spuro, same kiel malaperos la domoj, en kiuj ili loĝos, kaj la varsoviaj stratoj, kiujn ili promenos?
Ludoviko Zamenhof utiligis kaŝnomon almenaŭ parte por eviti identigon de la Lingvo Internacia kun iu aparta homgrupo, iu specifa medio. Kaj okazis rimarkinda transformiĝo. Preskaŭ senpense, kvazaŭ sekvante la normojn, kiujn sekvas ĉiu homa lingvo en sia evoluo, la parolantoj de la lingvo de doktoro Esperanto komencis atribui tiun nomon ne al la homo sed al la lingvo = la personeco de Doktoro Zamenhof kaj la fakto de la lingvo internacia komencis apartiĝi, kaj la kaŝnomo de la modesta doktoro transmoviĝis al lia lingvo. Dum Doktoro Zamenhof sekvis sian simplan sed laborplenan vojon, instigante la esperantistojn al ĉiam pli forta laboro, verkante, tradukante, revante, pri ĉiam novaj projektoj por proksimigi la homojn, pli kaj pli da personoj lernis kaj uzis kaj fleksis kaj riĉigis la lingvon Esperanto. Kaj kiam en 1917 Zamenhof mortis, Esperanto tamen vivis.
Ĝi vivis tra ĉiuj ŝtormoj, ĉiuj uraganoj — tra la skismo de Ido, tra la skuoj de la Unua Mondmilito, tra la korŝira malsukceso ĉe la Ligo de Nacioj, tra la persekutoj de la 30aj jaroj, tra la katastrofoj de la Dua Mondmilito. Ĝi vivis spite al antaŭjuĝoj, spite al superteraj reformoj, spite al organizaj fuŝoj, spite al ĵaluzoj kaj kvereloj.
Zamenhof nomis la fruajn adeptojn de la Lingvo Internacia „esperantoj": „Rapide kreskas la afero per laboro de la esperantoj." Lia poemo „La Espero" tiel implicas, ke la parolantoj de tiu lingvo aliĝas al la „rondo familia" de Doktoro Esperanto: ili fariĝas esperantoj. La historion de lia lingvo, spite al la obstakloj, spite la renversojn, punktas belaj sukcesoj, kuraĝaj agoj. Ni memoras la tradukon de „Hamleto", ni memoras Boulogne-sur-Mer, ni memoras la forajn pionirojn — Grabowski, Kazimierz Bein, Privat, Hodler. Ni memoras tiujn, kiuj tra la Unua Mondmilito laboris pere de Esperanto por ligi parencojn trans la batalado de oponaj armeoj. Ni memoras Kalocsay kaj Baghy. Ni memoras Cseh. Ni memoras la sukcesojn en Montevideo kaj Sofio. Ni memoras la kongresojn en Tokio kaj Pekino.

Ni ankaŭ memoras la personajn momentojn, kiuj vivigis Esperanton por nia unua renkontiĝo kun eksterlandanoj, nian unuan konsciiĝon, ke tiu ĉi stranga kombinaĵo de lingvaj elementoj, nete pakumita, bele ligita de la dek ses reguloj, fundamentita, kunmetita, afiksita — kun siaj akuzativoj kaj korelativoj — siaj o-oj kaj n-oj kaj e-oj — efektive funkcias, efektive vivas, efektive esprimivas. Se Zamenhof mortis, se herboj kreskas sur la ruinoj de iama Varsovio, Esperanto vivas, kaj prosperas. Kaj se ni kaj niaj kolegoj maljuniĝas en nia kunlaboro, vivas laste la esperantoj. Ili ĉirkaŭas nin tie ĉi, kaj ili portas nian lingvon en la estontecon.

Kion alportos tiu dua jarcento al Esperanto? Same kiel la unuaj adeptoj de la lingvo de doktoro Esperanto, same kiel la laboristoj, kiuj presis tiun broŝureton, ni apenaŭ povas profeti. Unu afero estas tamen tute klara: la lingvo mem, kiu pasis tra la fandejo de cent jaroj de evoluo, brile sukcesis. Neniu, kiu ĝin uzas, povas dubi, ĉu ĝi estas lingvo plena kaj kompleta. Neniu, kiu uzis ĝin en la scienco, aŭ legis ĝian literaturon, povas tion diri — eĉ se necesas daŭre ĝin modernigi kaj ankoraŭ kompletigi. Sed se ĝi brile sukcesis kiel lingvo, ĝi ankoraŭ ne brile sukcesis kiel lingva komunumo — la plejparto de la homoj ankoraŭ ne parolas ĝin, eble eĉ nenion scias pri ĝi. Ni havis niajn sukcesojn tiurilate: jen okazis sukcesoj informkampanjaj aŭ instruagadaj, jen oni akiris oficialan rekonon, jen fakuloj serioze ĝin traktis. Sed la granda laboro restas antaŭ ni. Ĝi estas ja giganta laboro. Ĝi estas nenio alia ol konvinki la homojn, ke Esperanto prezentas la plej bonan sol-

von al la lingvaj problemoj de la mondo. Ĝi tion faras ĉar ĝi estas facila kaj facile lernebla. Ĝi tion faras ĉar ĝi estas neŭtrala. Ĝi tion faras, ĉar ĝi traktas ĉiujn homojn en spirito de egaleco. Neniu alia lingvo tion faras. Tiuj aliaj lingvoj prezentas pseŭdosolvojn, kiuj privilegias certajn homojn super aliaj kaj kiuj disvastigas certajn kulturajn valorojn kaj ne aliajn. Ili foje bele aspektas, ili foje aspektas nehaltigeblaj, sed ili ne solvas la fundamentajn problemojn, kiujn Zamenhof celis solvi.

Ja fine lia lingvo estis kaj estas pli ol propanata solvo de la lingva problemo: ĝi estas provo alfronti la spiriton de malegalo, de netolero, de malamo, kiu tiel disŝiras nian belan kaj serenan mondon.

Multaj parolantoj de Esperanto ĝuas sian lingvon, kaj ĝin uzas, sen granda entuziasmo ĝin disvastigi. Al ili sufiĉas la kongresoj, ilia loka klubo, okazaj libroj aĉetitaj de la libroservo. Eĉ ĝenus ilian komfortan kaj hermetikan mondon subita alfluo de novaj lernantoj, novaj adeptoj. Ja per simpla utiligo de la lingvo ili helpas ĝian lingvan pliriĉigon. Sed, karaj gekolegoj, tio ne plu sufiĉas. Venas nun la periodo de disvastigo. Ni kreis murojn ĉirkaŭ ni: sekuraj en niaj kluboj kaj kongresoj, ni ne bonvenigas adekvate la novulojn, ni ne sufiĉe pledas por nia lingvo, ni ne alfrontas la publikon, ni ne agas sufiĉe discipline kaj celkonscie. Dirante tion, mi neniun akuzas, mi neniun kritikas. Mi simple faras tiun ĉi konstaton: ke la lingvo ekzistas unue por disvastigi, due por ĝui. Fojfoje ni inversigas tiun ordon, kaj forgesas nian veran celon.

Kiam Zamenhof kreis sian lingvon, li kaj liaj samtempuloj optimisme rigardis la estontecon. Ili opiniis problemojn solveblaj. Ili kredis je la prospero. La posta jarcento montris, ke ili pravis kaj ne pravis: ke altiĝis la intenseco de la sukcesoj kaj samtempe la intenseco de la malsukcesoj. Sed ni ne forgesu, ke, malgraŭ ĉio (kaj malgraŭ tio, ke la pliboniĝo ne estas universala), pliboniĝis la homa kondiĉo tra la pasintaj cent jaroj. Plivastiĝis la egaleco. Pligrandiĝis la demokratio. Necesas nun lerni la saman lingvon, por ke komune, solidare, en spirito de kompreniĝo, ni povu fronti kuraĝe la problemojn de la moderna mondo — laŭ la ekzemploj de Zamenhof kaj kun la sindediĉo, saĝeco kaj klarvido de realismaj esperantoj.

43a Internacia Junulara Kongreso de TEJO

Dum la jubilea jaro la junulara kongreso fariĝis aparte impona. Ĝi okazis de la 17a ĝis 24a de julio 1987 en Krakovo / Pollando. Partoprenis preskaŭ 1 000 junaj esperantistoj el 50 landoj, inter ili 49 el GDR. Laŭ la nombro la grupo el GDR estis sur la 4a loko.
Flanke de la Junulara Komisiono ĉe la Centra Estraro de GDREA partoprenis la kongreson Michael Lennartz, Detlef Kraus kaj Andreas Penk. La kadra temo de la kongreso estis „Civilizaciaj minacoj", kiu estis traktita en diversaj laborgrupoj kaj seminarioj.
Oni povis aŭskulti prelegojn pri jenaj temoj

— „Homoj kaj la minacoj de la civilizacio",
— „Pacaspektoj", „Polaj porpacaj iniciatoj",
— „La nuklea vintro", „Alkoholismo kaj misuzo de drogoj", „AIDS".

Ankaŭ estis esperantologiaj prelegoj, enkonduko en sanskriton kaj kurso de la pola lingvo. Tre abunda estis la kultura programo. Oni povis vidi teatraĵojn de pupteatroj el Bulgario kaj Pollando. La franca grupo „La Krizalido" prezentiĝis. Ne mankis rokmuziko. Dum la internacia vespero prezentiĝis ankaŭ GDR-esperantistoj kun malgranda kultura programo.
Kompreneble dum la kongreso ankaŭ kunsidis la Estraro kaj Komitato de TEJO. La diskutoj montris, ke TEJO troviĝis en iom granda kadrulo krizo. Ankaŭ mankas iu klara strategio pri la estonta agado. Elektiĝis kiel nova prezidanto Jan Koszmaluk (Pollando). Ĝenerala sekretario fariĝis Dittrich Weidman (Svisio). Krome al la estraro apartenas S. Hideg kaj R. Baross (ambaŭ el Hungario) kaj la kasisto C. Rouget el Francio.

La 44a kongreso okazos 1988 en Zagreb/Jugoslavio.

TEMINOLOGIA ESPERANTO-CENTRO

Dum la Jubilea Universala Kongreso en Varsovio UEA oficiale fondis Terminologian Esperanto-Centron (TEC). Per tio la ĝisnuna TeS (Terminologia Sekcio de UEA) transformiĝis al nova, pli vaste strukturita organizo, kiu daŭrigos kaj intensigos la ĝisnunajn klopodojn. TEC celas plibonigi kaj unuecigi la terminologian laboron en Esperanto per studado kaj adaptado de principoj kaj gvidlinioj de internacia terminologi-normiga agado. Necesas tiom levi la nivelon de nia fakvortarista laboro, ke eblas reprezenti Esperanton en naciaj kaj internaciaj terminologiaj kaj normigaj institucioj kaj kunlabori kun ili je reciproka utilo.

La „centra unuo" en la strukturo de TEC estas la Normiga Sekcio. Ĝi zorgos pri klasifiko de temoj kaj starigo de prioritatoj; ĝi organizos la preparon, diskutadon kaj aprobon de Esperanto-terminaroj. Ĝia sidejo estos en Prago, ĉar en Ĉeĥoslovakio la publika konscio pri neceso kaj utilo de normoj estas relative plej progresinta, sed planita estas internaciigo per almembrigo de spertiĝintaj specialistoj. Jen la proritate prilaborendaj bazaj terminaroj:

— Tekniko ĝenerale
— Komerc-ekonomiko ĝenerale
— Komerc-juro ĝenerale
— Informadiko
— Politiko
— Kulturo.

Starigo kaj evoluigo de kontaktoj kaj certigo de la informfluo inter TEC kaj siaj organizoj estos tasko de reprezentantoj de fakaj, landaj kaj aliaj specialaj Esperanto-institucioj. Ili formos internacian, interfakan reton, kiu helpu ligi kontaktojn inter la terminografie laborantaj specialistoj kaj diversmaniere subtenu ilian aktivecon.

La Sekretario de TEC, kiu (jam tradicie) laboras en Budapeŝto, zorgas pri la ĝenerala korespondado kaj informado, registras kunlaborantojn kaj interesitojn, teknike kontribuas al preparado, redaktado, aperigado kaj disvastigado de TEC-dokumentoj kaj plenumas aliajn administrajn taskojn. Krome li redaktos la TEC-bultenon, kiu estos la ĉefa ligilo inter la TEC-anoj.

Por altigi la sciencan nivelon kaj certigi komunan teorian bazon por la terminologia laboro, TEC aranĝos Terminologiajn Kursojn (similajn al tiu, kiun okazigis ĈEA en Roudnice n. L. en 1986) kaj specialajn seminariojn por gvidantoj (TEC-komitatanoj, precipe reprezentantoj de fakaj kaj landaj Esperanto-asocioj) pri la **organizado** de la terminologia laboro.

Se vi deziras pli detalajn informojn pri TEC, skribu al:

Ivan Bujdoso, Sekretario de TEC
Pf. 193
Budapest
H — 1368

Se vi volas partopreni en la kompilado de unu el la bazaj terminaroj, kontaktu kun:

Inĝ. Jan Pospíšil, Estro de Normiga Sekcio de TEC
Lublanská 49,
Praha 2
CS — 120 00

Se vi havas specialajn demandojn pri la reto de TEC-reprezentantoj, turnu vin al:

Wera Blanke, Sekcio de TEC-Reprezentantoj
Otto-Nagel-Str. 110, Pf. 113—05
Berlin
DDR — 1141

En Rostock: priplanlingvaj ekzamenoj

En la Universitato de Rostock, fako slavistiko/anglistiko por la 4-a studojaro de studentoj de pedagogio, dum junio 1987 d-rino Cornelia Mannewitz prezentis prelegojn pri planlingvaj problemoj. Rezulte de tio 32 studentoj ekzameniĝis sur la nivelo de ĉiujaraj „testaĵoj". Jen paŝo al enkonduko de inetrlingvistika problemaro en la universitatan instruadon.

„La revo de d-ro Zamenhof

Sub la ĉi-supra titolo la redakcio por lernejaj disaŭdigoj (Schulfunk) de la stacio Radio DDR disaŭdigis la 19-an de septembro 1987 30-minutan radioscenaĵon pri la vivo de Zamenhof kaj la 100-jara Esperanto. La scenaĵon verkis Detlev Blanke. Unu el la du parolistoj estis Wera Blanke.

Detlev Blanke

Atingoj kaj problemoj de la 100-jara Esperanto: socipolitikaj aspektoj

1. Por sojle de la dua jarcento baziĝi je la pozitivaj spertoj de la 100-jara Esperanto, por lerni el eraroj kaj por solvi ankoraŭ nesolvitajn problemojn, necesas multflankaj analizoj: Prijuĝo de la atingita pozicio de la lingvo nur el la vidpunkto de la tradiciaj Esperanto-komunumaj celoj povas konduki al pesimismo, miskompreno j kaj retiriĝo el elitismaj pozicioj. Socipolitika enkadrigo de la fenomeno Esperanto en la historiajn procesojn evidentigas, ke la pasintaj cent jaroj ne donis objektivan bazon por pli vasta oficiala internacia utiligo de la lingvo. Du mondmilitoj, revolucioj, diktatoraj reĝimoj, internacia streĉitecoj kaj la fakto, ke la situacio de internacia lingva komunikado ankoraŭ ne atingis la krizan punkton, grandparte klarigas la **relativecon** de la sukceso de Esperanto.

2. Konstateblas i. a. jenaj ĉefaj atingoj:

2.1. Ke la lingvo malgraŭ malfavora historia situacio pli kaj pli vaste aplikiĝis, evoluadis kaj fariĝis certagrade kulturpolitika faktoro, mem estas **ĝia plej granda atingo**. Pro la objektivaj procesoj de la scienc-teknika revolucio kaj la tendence iom-post-ioma plidemokratiiĝo de la internaciaj rilatoj (Fina Akto de Helsinki, UNESKO-politiko, malarmad-klopodoj) la perspektivo de Esperanto komenciĝis nur antaŭnelonge.

2.2. Plua atingo estas la senkonkurenceco de Esperanto kompare al aliaj planlingvaj sistemoj, malnovaj kaj daŭre nove aperantaj. La senkonkurenceco de Esperanto konsistas ĉefe en ĝia sufiĉa „lingva boneco" (Wüster) kaj la sufiĉeco de la parolantaro, kiu ebligas daŭre pli vastan kaj pli diferencitan aplikon kaj pro tio evoluon de la lingvo kaj inverse.

2.3. La funkcianta Esperanto-parolantaro estas mikromodelo de optimumigita internacia lingva komunikado, sendiskriminacia kaj principe altefika, kiu permesas konkludojn en la senco de la 11a Marksa tezo pri Feuerbach, parafrazita interlingvistike jene: „La lingvistoj ĝis nun nur diversmaniere priskribis la mondan lingvo-problemon, sed necesas solvi ĝin".

2.4. La funkcianta Esperanto por la lingvoscienco estas principe nova fenomeno, deviganta rompon de kelkaj lingvistikaj mitoj kaj ĵetanta novan lumon sur la rilaton inter homo kaj lingvo.

3. La kaŭzoj por la relativa sukceso de Esperanto estas a) lingvo-struktu raj (sufiĉa lingva boneco) kaj aparte b) nelingvaj, nome lingvopolitikaj faktoroj, ĉar la lingvo estas multe pli ol strukturo, nome socia fenomeno firme ligita al homaj grupoj kun komunikaj celoj, bezonoj kaj ide(al)oj, kiuj pli gravas por lingva sukceso ol unuopaj lingvaj ecoj mem.
La nekompreno de tio estas bazo por sennombraj novaj projektoj, por reformoj de Esperanto, por la sinteno de multaj esperantistoj, kiuj volas solvi perspektivajn problemojn de Esperanto lingvostrukture, kiuj nur solveblas lingvopolitike.
Kontraste al multaj planlingvaj aŭtoroj, Zamenhof saĝe kondutis lingvopolitike i. a. ĝuste alirinte la problemojn de a) projekto — lingvo, b) individuo — kolektivo, c) humanisma enhavo kaj larĝeco de la komunikaj celoj, d) elito — amasoj, e) evoluo — stabiligo (normo kaj kodigo). Ĉiuj ĉi-tiuj problemoj hodiaŭ estas plene aktualaj kaj ofte ne sufiĉe atentataj.

4. Sojle al la dua jarcento de Esperanto necesas konscii kaj solvi kelkajn por la estonteco de la lingvo fundamente gravajn problemojn, kiuj havas socilingvistikajn kaj lingvopolitikajn aspektojn.

4.1. Necesas sciencnivele kaj sisteme esplori ne nur la ĝeneralajn ecojn de Esperanto devenantajn el ĝia **lingveco**

sed ankaŭ ĝiajn **specifajn ecojn** devenantajn el ĝia **planiteco**. La ĝenerala iĝnoro de ĉi-tiu specifeco, la senzorga kaj tro absoluta fido al la „natura" evoluo de la lingvo malhavigos al Esperanto grandajn avantaĝojn (ekz. en la fakleksiko), pri kiuj etnolingvoj disponas nur en pli limigita grado.

Necesas sisteme plialtigi la faktoron de konscieco ,evoluigi pli kritikan lingvan kulturon kaj, i. a., principe rekonsideri la taskon, funkcion, labormetodojn kaj konsiston de la Akademio de Esperanto, kiu komplete ne sufiĉas al la nuntempaj bezonoj de la lingva komunumo de Esperanto.

4.2. La ĝenerala nekontentiga situacio de la esperantologio ne nur ŝuldiĝas al la esperantologoj mem sed unuavice al la manko de lingvopolitika kompreno en la Esperanta lingva komunumo. En la esperantologiaj aktivecoj regas i. a. hazardeco, nesistemeco, nesufiĉa rapido en la pretigo de ege necesaj verkoj (ekz. nova eldono de PIV, Bildvortaro), hobieco, manko de konscio pri prioritataj taskoj, manko de materia bazo.

Ne nur la ekstermovadaj postuloj al la esperantologio flanke de DLT[1]) kaj la pliinteresiĝo de la moderna lingvoscienco, sed ankaŭ la konkretaj evoluantaj komunikaj bezonoj (ekz. en la fakaj sferoj) i. a. necesigas:

— ellaboron de klaraj esplorprogramoj kun indiko de prioritatoj
— stimuligo kaj kunordigado de esploroj
— profesiigo de esperantologiaj esploroj (ĉefe per naciskalaj bazoj)
— kompleta rekonsidero de la rolo de la Akademio de Esperanto.

La esploroj kaj laboroj koncentriĝu i. a. je la a) priskribo de la nuna Esperanto (sinkronio) kaj ties evoluotendencoj (diakronio) b) pretigo de bazaj esperantologiaj enkondukaj verkoj kun ampleksaj bibliografioj (i. a. moderna gramatiko kaj sistema leksikologio),c) kunordigita ellaboro de grandaj (= mezaj) vortaroj nacia lingvo-Esperanto, d) kunordigado de terminologiaj aktivecoj en la kadro de la ĵus fondita Terminologia Esperanto-Centro kaj kreo de altnivelaj fakvortaroj, e) heŭristika valoro de Esperanto (i. a. propedeŭtika instruado, valoro por maŝintradukado), f) esploroj pri la lingva komunumo, g) certigo de materiaj kondiĉoj (i. a. esperantologia revuo).

4.3. La konsisto de kaj la internaj procesoj en la lingva komunumo reflektiĝas en la lingvo mem (stiloj, tavoloj, ideologio-dependa leksiko, esperantonimoj, eliteca „lingvoevoluigo") kaj helpas aŭ malhelpas la nivelon de la apliko kaj evoluo de la lingvo.

Pro tio necesas i. a. sociologiaj esploroj pri la konsisto, esperantiĝo-motivoj, celoj kaj kondutmanieroj de la komunumanoj. Ili necesas por tiri konkludojn kiel celkonforme gvidi la komunumon, varbi novajn adeptojn, veki latentajn potencojn aŭ subpremi nedeziratajn fenomenojn (ekz. sekteco, kiu objektive daŭre kaj abunde malutilas al la lingvo kaj ties adeptoj).

Por pliefikigi la potencojn de la lingva komunumo, por pligrandigi la komunumon pli rapide per valoraj kaj kapablaj novaj anoj necesas rekonsideri kelkajn strukturajn problemojn de la komunumo, i. a. la sistemon de a) publikaĵoj, b) edukado, c) scienca apliko, d) aranĝoj (inkluzive kaj ĉefronte la Universalajn Kongresojn).

4.4. La rilato de la neesperantista mondo al Esperanto kaj ĝia lingva komunumo ofte estas stampita per antaŭjuĝoj, kiuj troviĝas a) ekster la komunumo kaj b) en la komunumo mem. Parton de ambaŭ faktoraj grupoj oni povas pozitive influi, aparte per serioza laboro kaj certe ne per bojkotado de naciaj lingvoj, ŝanĝo de la lingvonomo Esperanto aŭ aliaj paŝoj.
Necesas ellaboro de „principaro de konduto, informado kaj argumentado".

5. La porta scienca disciplino, por enigi Esperanton en la lingvosciencan konscion estas interlingvistiko nur tiam, se oni komprenas ĝin ne malvaste kiel „sciencon pri planlingvoj" sed en larĝa socipolitika skalo kiel „lingvosciencan disciplinon esploranta **ĉiujn aspektojn** de la internacia lingva komunikado cele al ĝia optimumigo".

Interlingvistiko kaj esperantologio dum la 14-a Internacia Kongreso de Lingvistoj

Interlingvistikaj problemoj ĝis nun ludis certan rolon en la kadro de internaciaj kongresoj de lingvistioj nur tri fojojn:
1931 dum la 2-a en Ĝenevo,
1948 dum la 6-a en Parizo kaj 1987 dum la 14-a en Berlin (GDR).
1931 **Otto Jespersen** diskutigis la lingvistojn pri la problemo de „artefarita lingvo" kaj popularigis la nocion „interlingvisitko". 1948 la bazan raporton por la sekcio D („interlingvistiko") donis **André Martinet.** La 14-a kongreso, kiu okazis de la 10-a ĝis la 15-a de aŭgusto 1987 en Berlin (GDR), traktis la kadran temon „Unueco kaj diferenceco en la nuntempa lingvoscienco. Disciplinoj kaj interdisciplinaj alproksimiĝoj kaj rezultoj".
Pro la bona reputacio, kiun interlingvistiko ĝuas en lingvistikaj rondoj de GDR, ne estis malfacile proponi al la organizantoj enkadrigon de koncerna temaro en la kongresan programaron. La rezultoj estis:

1. Dum la kongreso funkciis kiel n-ro 13 la oficiala „Ronda Tablo Interlingvistiko/Planlingvoj" (Round Table Interlinguistics/Planned Languages), unu el 22 de tiaj „rondaj tabloj". Ĝin inici-

---

daŭrigo de p. 132

6. Por atingi pli sisteman esploron de la aktualaj problemoj solvendaj sojle ĉe la dua jarcento de Esperanto konvenus fondo de konstanta „Internacia Konsilantaro — Lingvo kaj Mondo", kiu estus sendependa instanco de ekspertoj. La konsilantaro traktu la lingvon kaj ĝian komunumon kune, utiligu jam ekzistantaj aktivecojn, arangojn, instancojn kaj eldonaĵojn, stimuli, kunordigadu kaj eventuale mem entreprenu esplorojn kaj fine ellaboru science bazitajn rekomendojn larĝe disvastigendajn en la lingva komunumo.
[Resumo de prelego pezentita kadre de la 10-a Internacia Esperantologia Konferenco, kiu okazis lige al la 72-a UK 1987 en Varsovio]

ciatis, preparis kaj gvidis **d-roj Detlev Blanke, Ronald Lötzsch** (ambaŭ el GDR) kaj **Sergej N. Kuznecov** (Moskvo). Dum du kunvenoj de la Ronda Tablo, kiu estis indikita en la kongresprogramo kaj sur la informtabuloj, estis prezentitaj entute 9 kontribuoj, po 20 minutoj kun 20minuta diskuto.

1.0. Post mallonga enkonduko fare de **d-ro Detlev Blanke,** kiu difinis la nociojn „interlingvistiko" kaj „planlingvo" kaj atentigis pri la ĝisnuna rolo de interlingvistikaj problemoj dum la internaciaj kongresoj de lingvistoj, sekvis jenaj prelegoj:

1.1. „Latino kiel lingvo de la scienca komunikado en pasinteco kaj nuntempo" **(prof. d-ro sc. Johannes Irmscher,** membro de la Akademio de Sciencoj de GDR), en la germana

1.2. „Kian lingvon por kia komunikado!" **(d-ro Francisko Lo Jacomo,** Parizo), en la franca

1.3. „Komputila lingvistiko kaj interlingvistiko" **(d-ro Hartmut Sörgel,** Humboldt-Universitato Berlin, GDR), en la germana

1.4. „Planlingvo kaj ĝia signifo por lingvistika teorio" **(d-ro sc. Sergej N. Kuznecov,** Instituto por Lingvisitko ĉe Akademio de Sciencoj de USSR, Moskvo), en la angla

1.5. „Lingva tipologio kaj planlingvoj" **(d-ro Dan Maxwell,** USONO, nun ĉe BSO Utrecht, Nederlando), en la germana

1.6. „Semantika esprimforto kaj sintaksa unusignifeco. Esperanto kiel interlingvo de aŭtomata tardukado" **(d-ro Klaus Schubert,** FRG, nun ĉe BSO Utrecht, Nederlando), en la germana

1.7. „Pri la ‚facileco' de Esperanto" **(d-ro Stanislav Košecký,** Bratislava, Slovaka Filologia Societo), en la germana

1.8. „Diakronio en planlingvo — ĉe la ekzemplo de la 100-jara Esperanto" **(d-ro sc. Detlev Blanke,** Kulturligo, Berlin, GDR) germane

1.9. „Gramatikaj germanismoj en Esperanto" (**d-ro Ronald Lötzsch**, Centra Instituto por Lingvoscienco ĉe la Akademio de Sciencoj de GDR), en la germana

La du kunsidojn ĉeestis meze 20 — 25 personoj. Sekvis la prelegojn vigla diskuto, parte en la germana, angla, franca kaj ankaŭ kelkfoje en Esperanto.

1.10. En la kadro de alia Ronda Tablo nome en n-ro 8 „Aŭtomata Tradukado" prelegis **d-ro Viktor Sadler** (Grandbritio, nun ĉe BSO en Utrecht, Nederlando) pri DLT., en la angla.

2. Krom la „rondaj tabloj" funkciis 30 sekciaj kunsidoj, kun po 10, 20 aŭ eĉ 30 prelegoj, depende de la disponigita tempo. La prelegoj daŭris 15 minutojn. Nur eblis 5-minuta diskuto. Inter ili estis tri prelegoj kun interlingvistika temaro (respektive rilata al ĝi):

2.1. Sekcio 6A „Leksika semantiko"

„De vortaro al sciobanko (knowledge Bank") (**d-ro Victor Sadler**, Grandbritio, nun ĉe BSO en Utrecht, Nederlando), en la angla

2.2. Sekcio 9 „Lingvoplanado kaj lingva politiko"

„Kelkaj konsideroj pri la objekto de interlingvisitko" **(d-rino Alicja Sakaguchi,** universitato Frankfurt/Main, FRG), en la germana

2.3. Sekcio 15 „Komputila lingvistiko"

„De teoria skizo al praktikaj decidoj: la duonaŭtomata traduksistemo DLT" (**d-ro Klaus Schubert**, FRG, nun ĉe BSO Utrecht, Nederlando), en la germana
Aparte vigla estis la diskuto post la prelego de **d-ro Schubert.** Ĉar li parolis kiel lasta dum la sekcia kunsido, li havis je la dispono ne nur 5, sed pli ol 20 minutojn de diskuttempo.

3. Pri la publikigo de la materialoj:

3.1. La resumoj de 2.1. - 2.3. aperis en la ampleksa verko „Abstracts of Section Papers and Round-Table Talks" XIVth International Congress of linguists. Berlin: Editorial Commitee 1987 (2.1.: p. 167, 2.2.: p. 251, 2.3.: p. 417)

3.2. Aperos en la jaro 1989 ĉirkaŭ 3 200 paĝa verko „Proceedings of the XIVth International Congress of Linguists (held in Berlin/GDR, 1987) Organized under the auspices of CIPL", eldonantoj: Werner Bahner/Joachim Schild, Dieter Viehweger.

Eniros ĉi-tiun verkon ĉiuj resumoj de la interlingvistaj rondtablaj prelegoj (1.1. — 1.10.) kaj 5-paĝa resuma raporto. Krome eniros la plenaj tekstoj de ĉiuj sekciaj prelegoj, do ankaŭ de 2.1. — 2.3.

3.3. Estas planata la eldono de la prelegoj prezentitaj kadre de la interlingvistika „ronda tablo".

Tiom pri la ĉefaj rezultoj. Valoras ankoraŭ substreki du aferojn:

1. Malsame al la 2-a kaj 6-a kongresoj ĉi-foje, dum la 14-a, oni ne diskutis nur teoriajn interlingvistikajn demandojn, sed plej grandparte povis eliri el la faktoj de la 100-jarojn funkcianta Esperanto. La preparkomitato de Kongreso aparte bonvenigis la esperantologiajn prelegojn, ĉar ili ankaŭ estis komprenataj kiel omaĝo al la 100-jara lingvo. Fakte tio estis en la spirito de la UNESKO-rezolucio.

2. Estis interesa la lingva konduto de lingvisto-kongreso. La oficialaj laborlingvoj estis la angla, la rusa, la franca kaj la germana. La vera utiligo estis proksimume jena (resumotekstoj): angla: 43,8 %, germana: 40,7 %, rusa: 10,5 %, franca: 5,0 %.
Tamen, dum diskutoj la rusa ludis preskaŭ neniun rolon kaj la franca estis relative malofte uzita. La ĉefaj lingvoj estis proksimume samrangaj la angla kaj la germana.
La 15-a Internacia Kongreso de Lingvistoj okazos post 5 jaroj. La datoj kaj loko ankoraŭ ne estas konataj. La 14-a kongreso montris, ke estas relative facile enigi interlingvistikajn temojn en la kongresprogramon, kvankam ne en la 18 plenkunsidajn ĉefreferaĵojn. (Ili aperis kiel antaŭpreso: Preprints of the plennary session papers. XIV. International Congress of Linguists. Berlin 10. — 15. August 1987, Berlin: Editorial Committee).

D. Blanke

D-ro Istvan Szerdahelyi (1924 – 1987)

La 21-an de aŭgusto, unu tagon post sia 63-a naskiĝtago, forpasis post grava malsano la konata interlingvistiko kaj metodikisto, la vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio, d-ro jur. Istvan Szerdahelyi, docento pri interlingvistiko kaj Esperanto. Lia morto ne nur estas granda perdo por la hungara Esperanto-movado, sed ankaŭ por la internacia.

D-ro Szerdahelyi fondis 1966, do antaŭ pli ol 20 jaroj, en la filozofia fakultato de la Universitato ELTE, Budapest, la fakon „Esperanto, lingvo kaj literaturo". Tiu unua fako en la mondo ebligis eduki diplomitajn Esperanto-instruistojn, interlingvistojn kaj esperantologojn. Dum 20 jaroj diplomiĝis entute 98 personoj, el inter ili 11 eksterlandanoj: el Jugoslavio (2), Pollando (2), ČSSR (2), Alĝerio (1), Bulgario (1), Danlando (1), Japanio (1), Vjetnamio (1) kaj Italio (1).

Istvan Szerdahelyi plenumis grandegan laboron. Li devis mem krei la universitatajn lernolibrojn pri metodiko, interlingvistiko kaj Esperanto. Li verkis sennombrajn studojn, ofte prelegis dum internaciaj aranĝoj, ĉar li havis diversajn funkciojn. Grava rekono por lia scienca agado estis lia nomumo al docento pri interlingvistiko flanke de la universitato. Tio signifas, ke li estis la unua universitata docento por tiu fako en la historio de Esperanto kaj en la historio de interlingvistiko. 1985 li transprenis la prezidantecon de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kies scienca motoro li jam longe estis. En GDR li restadis dum la jaro 1978, okaze de la internacia seminario en Ahrenshoop „Esperanto: sciencaj aspektoj". Diversaj artikoloj el lia plenumo ankaŭ aperis en „der esperantist". Pro siaj grandaj meritoj por la Esperanto-movado, Universala Esperanto-Asocio elektis lin honora membro.

Ĉar d-ro Szerdahelyi pluvivos en siaj verkoj, eble plej bona omaĝo estas, doni elektan liston de liaj plej gravaj publicaĵoj pri interlingvistiko, esperantologio kaj metodiko:

1. Interligvistiko. Celo, objekto, metodo. En: Norda Prismo, Boras, N-ro 4 — 5 (1965), p. 150 — 151
2. Esperanto et propédeutique lingvistique. En: Les langues modernes. Paris, vol. LX, N-ro 3 (1966), p. 255 — 159
3. Eszperanto 1. (lernolibro), Budapest 1966
4. Eszperanto 2. (lernolibro), Budapest 1968
5. Pri la slango de TEJO-anoj. En: der esperantist, n-ro 48 (1971), p. 6 — 7
6. Onomastiko en Esperanto. En: Literatura Foiro, aprilo 1971, p. 12 — 15
7. La lerneja instruado de la Internacia Lingvo. En: Internacia Pedagogia Revuo, Nürnberg, (1971), N-ro 1, p. 8 — 19
8. Esperanto 1. Internacia Lernolibro Budapest 1972
9. Lingvistiko, interlingvistiko, esperantologio. En: Literatura Foiro 4 (1973), N-ro 17 — 18, p. 1 8— 22
10. Kelkaj gnozeologiaj problemoj de scienca esploro de Esperanto. En: Scienca Revuo, Beograd, vd. 24 (1973), N-ro 2 — 3 (100 — 101), p. 41 — 50
11. Pedagogiaj valoroj de instruado de Esperanto. En: Tišljar, Zl. (1975, Red.): Internacia Lingvistika Simpozio. Kumrovec, p. 9 — 18
12. La semantika modelo de Esperanto: En: Tišljar, Zl. (1975, Red.): Internacia Lingvistika simpozio. Kumrovec, p. 85 — 152
13. Metodologio de lingvoinstruado kaj parol-alproprigo. Budapest 1975. (2-a eldono 1981)
14. Planlingvistika dokumentaro. En: der esperantist, Berlin, n-ro 77 (3/1976), p. 9, n-ro 78 (4/1976), p. 16 — 17, n-ro 79 (5/1976), p. 17 — 18, n-ro 82 (2/1977), p. 10 — 11
15. „Jes, Esperanto estas vera lingvo!", Respondo al Spang-Hannsen. Studoj 8 (Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de Fonds), 1976
16. Vorto kaj vortelemento en Esperanto. Studoj 10 (Kultura Centro Esperantista), Kuopio 1976
17. Enkonduko en la interlingvistikon — skizo de prelego (kun bibliografia aldono). En: Behrmann, H. (1976, Red.): Über Informatik und Interlinguistik/Pri Informadiko kaj Interlingvistiko. Paderborn: FEoll (FEoll-Papier 24)
18. Eszperantó. Bevezetés és nyelvgyakorlatok. Budapest 1976
19. La Esperanta Morfemaro. En: Esperantologiaj Kajeroj 1, Budapest, p. 61 — 120
20. La artikolo. En: Esperantologiaj kajeroj 1, Budapest, p. 121 — 132
21. Ci-ĉu mortnaskita? En: Esperantologiaj kajeroj 1, Budapest, p. 133 — 136
22. Skizo pri morfemiko de Esperanto. En: Sciencaj komunikaĵoj. Budapest 1976, p. 11 — 24
23. Bábeltöl a világnyelvig, Budapest: Gondolat, 1977
24. Interlingvistiko — historia trarigardo, nuna stato, perspektivo. En: Behrmann, H. (1978, Red.): 2. Werkstattgespräch „Interlinguistik in Wissenschaft und Bildung". Paderborn: FEoll (FEoll-Papier 38), p. 100 — 126
25. Interlingvistiko en Hungario. En: Blanke, D. (1979, Red.): La internacia lingvo: sciencaj aspektoj, Berlin: Kulturbund, p. 71 — 74

26. La didaktika loko de la Internacia Lingvo en la sistemo de lernejaj studobjektoj. En: Blanke, D. (1979, Red.): La internacia lingvo: sciencaj aspektoj, Berlin: Kulturbund, p. 71 — 71
27. Metodiko. En: Pechan, A. (1979, Red.): Gvidlibro por supera ekzameno, Budapest, p. 279 — 338
28. Krestomatio de Esperanta literaturo, Tekstoj, dataro, bibliografio. vol. I (1979), vol. II (1981), vol. III (1982), Budapest: Tankönyvkiadó
29. Enkonduko en la interlingvistikon. En: Carlevaro, T./Lobin, G. (1979, Red.): Einführung in die Interlinguistik. Alsbach: Leuchtturm-Verlag, p. 9 — 86
30. Pri la lingvistika priskribo de Esperanto. En: Blanke, D. (1979, Red.): La internacia lingvo: sciencaj aspektoj. Berlin: Kulturbund, p. 111 — 115
31. Bevezetés az interlingvisztikába. Történeti vázlat és forrástanulmány. Budapest 1980
32. Lernejaj reformoj kaj Esperanto. En: Esperanto, Rotterdam, 3/1979; der esperantist, Berlin, n-ro 101 (1980), p. 52 — 56
33. Interlingua — interlingva — interlingvisztika. Új nyelvészeti fogalmak, En: Balasz, J. (1980, Red.): Nyelvi rendszer és nyelvhaszuálat. Budapest, p. 323 — 334
34. Miscellanea interlingvistica (Red.), Budapest 1980
35. La Hungara modelo en interlingvistiko. En: Szerdahelyi, I. (1980, Red.): Miscellanea interlinguistica, p. 14 — 100
36. Interlingvistiko: nocio kaj fako. En: Planlingvistiko, 1, vintro 1981, n-ro 0, p. 4 — 6, La Chaux-de-Fonds
37. La instrupraktiko. En: Barcsay, Zs. (1982, Red.): Metodiko en la praktiko. Paderborn: Esperanto-Centro, p. 21 — 30
38. Entwicklung des Zeichensystems einer internationalen Sprache Esperanto. En: Fodor, I./Hagége, L. (1984, Red.): Language Reform. History and Future. vd. III. Hamburg: Buske, p. 277 — 308
39. La leksikologiaj problemoj de la terminologio. En: Planlingvistiko 2, N-ro 6 (1983), p. 1 — 3, 3, n-ro 9 (1984), p. 7 — 12, n-ro 12 (1984), p. 1 — 2
40. Spracherneuerung und Sprachschöpfung in Ungarn zur Zeit der Aufklärung und in der Reformzeit. En: Annales Universitatis Scientiarium Budapestinensis de Rolando Eötvös nominatae. Sectio linguistica. Tomus XV. Budapest 1984, p. 239 — 250
41. Signo, signilo, signifo-integrado. En: Haupenthal, R. (1985, Red.): Li kaj ni. Festlibro por la 80-a naskiĝtago de Gaston Waringhien. Antverpeno — La Laguna: Stafeto/Kehlet, p. 313 — 336
42. Neologismoj en Esperanto. En: Planlingvistiko, 4, n-ro 14 (1985), p. 1 — 7
43. Alkalmazott nyelvészeti alapfogalmak. Tanulmányok, szemelvények, I. rész. Budapest. Tankönyvkiadó, 1985
44. Raimundus Lullus kaj la filozofia lingvo. En: Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo. vd. I, Filologia, La Laguna. Universidad de la Laguna 1985, p. 711 — 738
45. La morgaŭo de la fremdlingva instruado. En: Internacia Pedagogia Revuo, Antverpeno 16, n-ro 2/1986, p. 1 — 9
46. Diakrona kaj sinkrona esperantologio. En: Informilo por Interlingvistoj, Varsovio, n-ro 2/87 (14), p. 10 — 12
(Bibliografio de la verkoj de Szerdahelyi ĝis 1976, kiu ankaŭ enhavas multajn ruslingvajn verkojn (lernolibroj) aperis 1977: Verkaro de d-ro István Szerdahelyi. En: Esperantologiaj kajeroj, n-ro 2, Budapest: ELTE-Universitato, 1970, p. 259 — 271)

Detlev Blanke

Prof. Szerdahelyi — mia lasta renkontigo kun li

Li mankis al ni dum la XXI-a ILEI-konferenco en Łódź, en julio 1987, pro serioza malsano li ne povis partopreni ĝin. Sed li anticipe estis preparinta gravajn diskutmaterialojn, ekz. la „Propono pri regularo por unueca ekzamen-sistemo". Salutleteron ni sendis al li el Pollando, esprimante nian deziron, ke li baldaŭ resaniĝu.

Pasigante feriojn en Hungario, mi vizitis lin en hospitalo. Estis la 18-a de aŭgusto, Budapeŝto, universitata kirurgia kliniko n-ro I, ĉambro 110.

Ĉe malfermita pordo, sur lito sidis li, tra la pijamo reliefiĝis plastmasaj tubetoj, lia vizaĝo — ostoj, okuloj, tenebroj.

Iom malrapide li estis reaginta al ni: mi kaj Barcsay Zsuzsa. Ekbrilis liaj okuloj, hungare kaj esperantlingve li demandis flustre pri la rezultoj de la lasta konferenco de la esperantistaj instruistoj; modesta ĝojo, kiam ni enmanigis al li kiel prezidanton de la Ligo[1]) la honorinsignon de la Bulgara Esperantista Asocio — la lastan dumvivan honorigon.

Poste li kuŝiĝis, ni kovris lin per litkovrilo, lia voĉo mallaŭtiĝis, sed —: „Morgaŭ mi revenos hejmen!!"

Subite — denova ekbrilo de la okuloj, ili kvazaŭ traradiis min. Mi turniĝis reen kaj ekvidis lian edzinon — Ŝi alpaŝis al li, tuŝis lian frunton, devigis de lia vizaĝo la ŝviton.

Ni mallaŭte adiaŭis al li, ĉu ni diris la vortojn „ĝis revido"?

La 22-an de aŭgusto, telefonalvoko el Budapeŝto: „Ne forgesu la okulojn de Szerdahelyi. Li mortis."

Till Dahlenburg

[1]) Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, ILEI



Jen stabanoj de la Esperanto-redakcio de Radio Polonia. De maldekstre dekstren: Andrzej Pettyn (estro de la redakcio), Barbara Pietrzak, Gabriel Brzeminski (staranta), Anna Henn (staranta), Milada Szwedo, Jerzy Uspienski, Jan Klimek.

La programo de Radio Polonia Majo 1987 — Majo 1988

RADIO POLONIA disaŭdigas en Esperanto ĉiutage de pli ol 25 jaroj; la 4-an de aprilo 1984 oni festis la 25-jariĝon de la agado kaj la 26-an de julio 1986 oni aŭdigis la 30-milan elsendon.

En la disaŭdigoj apud novajoj, komentarioj pri polaj kaj internaciaj temoj, oni parolas pri soci-ekonomiaj, sciencteknikaj, kulturaj, turismaj, junularaj, sportaj kaj muzikaj temoj, kaj ankaŭ tre vaste pri la E-movado en Pollando kaj en la mondo.

KONSTANTAJ PROGRAMEROJ
(la horoj estas indikitaj laŭ la universala tempo (GMT), al kiu — en la landoj de la mezeŭropa tempo — vintre oni aldonas unu horon, somere — du horojn); R = reaŭdigo, ripeto.

ĈIUTAGE — escepte de dimanĉoj kaj festotagoj:
novajoj — 11.30, 15.30, 16.30
trarigardo de la varsovia gazetaro — 11.00, 15.30 (sabate nur 11.00)
radio-kuriero — 5.30 (escepte de dimanĉoj kaj lundoj), 19.30 (escepte de sabatoj kaj dimanĉoj)

LUNDE
5.30 — Esperanto-ekspreso (R)
11.00 — Kultura magazino (R)
15.30 — Sporto
16.30 — Kultura magazino (R)
19.30 — Aktuala temo; sporto (R)
21.30 — Aktuala temo; Koncerto kun bondeziroj

MARDE
5.30 — Koncerto kun bondeziroj (R)
11.00 — Koncerto kun bondeziroj (R)
15.30 — Aktuala temo; aŭ: E-temo
16.30 — Trarigardo de la E-gazetaro
19.30 — Aktuala temo; Koncerto kun bondeziroj (R)
21.30 — Trarigardo de la E-gazetaro (R)

MERKREDE
5.30 — Trarigardo de la E-gazetaro (R); polaj temoj
11.00 — Trarigardo de la E-gazetaro (R); polaj temoj
15.30 — Polaj temoj
16.30 — Pollando hodiaŭ (magazino)
19.30 — Polaj temoj
21.30 — Pollando hodiaŭ (R)

JAŬDE
5.30 — Pollando hodiaŭ (R)
11.30 — Pollando hodiaŭ (R)
15.30 — Polaj temoj
16.30 — Scienc-teknika rubriko
19.30 — Muzika magazino
21.30 — Literatura elsendo

VENDREDE

5.30 — Muzika magazino (R)
11.30 — Muzika magazino (R)
15.30 — Radio-Forumo (leterkesto)
16.30 — Polaj temoj
19.30 — Trarigardo de la E-gazetaro (R)
21.30 — Intervjuo(j) pri polaj aŭ E-temoj

SABATE

5.30 — Kultura magazino
11.00 — Radio-Forumo (R)
15.30 — Panoramo de internaciaj eventoj
16.30 — Esperanto-ekspreso (magazino)
19.30 — Esperanto-ekspreso (R)
21.30 — La semajno en Pollando; Radio-Forumo (R)

DIMANĈE

5.30 — La semajno en Pollando; scienc-teknika rubriko (R); Radio-Forumo (R)
11.00 — Literatura elsendo (R)
15.30 — Programero por komencantoj; E-ekspreso (R)
16.30 — Literatura elsendo (R)
19.30 — Programero por komencantoj (R); Kultura magazino (R)
21.30 — Programero por komencantoj; E-ekspreso (R)

ATENTON! Ni rezervas al ni la rajton laŭbezone ŝanĝi la programon!
Uzante la okazon ni deziras rememorigi, ke en niaj elsendoj ni dediĉas multe da atento al polaj kaj E-movadaj temoj. Ni proponas vin al k u n r e d a k t a d o de la elsendoj. Ni proponas nome, ke vi sendu al ni liston de la proponataj de vi konkretaj temoj polaj kaj E-movadaj, kiujn — laŭ via opinio — ni devus pritrakti en la proksima estonto. La listigitajn temojn sendu sur aparta paperfolio, sed en la sama koverto.
Fariĝu
KUNREDAKTORO DE VIAJ ESPERANTO-ELSENDOJ!

ATENTON: Se vi bezonas stokon da program-informiloj pri niaj E-elsendoj por via E-klubo, E-kurso, ktp., iuj skribu al ni. La program-informilojn ni sendas senpage. Nia adreso: RADIO POLONIA, Esperanto-Redakcio, 00-950 Varsovio, Box-46, Pollando.

La horoj kaj ondolongoj
5.30 — 6.00 41,27; 48,90; 50,04; 200 m (7270, 6135, 5995, 1503 kHz)
11.00 — 11.25 31,50; 41,99 m (9525, 7145 kHz)
15.30 — 15.55 41.18; 49,22 m (7285, 6095 kHz)
16.30 — 16.55 41,18; 49,22 m (7285, 6095 kHz)
19.30 — 20.00 41,18; 49,22 m (7285, 6095 kHz)
21.30 — 21.55 41,18; 49,22; 50,04; 200 m (7285, 6095, 5995, 1503 kHz)

KIEL AŬSKULTI PLI BONE?

Radioricevilo: Kontrolu, ĉu en via radioaparato estas la ondolongoj, kiujn uzas RADIO POLONIA; se ne, laŭeble havigu al vi tian radioaparaton; ĉe la aĉeto petu fakulon, ke li/ŝi helpu vin elekti laŭeble bonkvalitan radioricevilon kun mallongaj ondoj.
Skalo: Ne en ĉiu radioaparato troviĝas skalo kun bonaj ciferaj indikoj; se ĝi mankas, surgluu laŭlonge de la skalo mallarĝan paper-strion, sur kiu antaŭe signu per liniilo milimetrajn kaj centimetrajn distancojn; kiam vi trovos ĉiujn lokojn de niaj disaŭdigoj, notu en kajereto la horon, ondolongon en metroj aŭ kilohercoj kaj milimetran lokon (ekz. 21.30 h. — 41 m — 23-a milimetro); tiamaniere vi pli facile trovos nin.

Kurento kaj piloj: Se vi uzas kurenton, kontrolu, ĉu la tensio ĉiam estas ĝusta; se ne, uzu amplifilon (Ĝi estas pliigilo de elektra energio); se vi uzas pilojn (bateriojn), de tempo al tempo ŝanĝu ilin kaj enmetu la novajn.

Anteno por la meza ondo: Kutime ĝi troviĝas en la aparato mem; por pliboniĝi la akceptadon iom turnu la aparaton dekstren aŭ maldekstren kaj elektu plej taŭgan pozicion; se vi loĝas en granda dombloko, proksimigu la aparaton al la fenestro.

Teleskopa anteno: Se la ricevado ne estas tamen kontentiga, provu unue proksimigi vian manon al la anteno (kelkfoje ĉi tio helpas), due — tuŝu perfingre la antenon, iafoje per tio la akceptado pliboniĝas; trie — prenu la aparaton kun la eltirita anteno kaj delikate, por ne rompi la antenon, iom klinu ĝin aŭ eĉ metu horizontale kaj iom-post-iom turnu vin ĉirkaŭ via akso por elekti la plej bonan direkton, kvare — kun la aparato, kies anteno estas eltirita, malrapide iru tra la ĉambro, por trovi lokon, en kiu la aŭdebleco estas plej bona.

Memoru, ke bonkvalita radioricevilo ebligas bonkvalitan akceptadon de mallongondaj elsendoj.

Laborbrigado

La distrikta estraro de Bulgara Esperantista Asocio en urbo Pleven por sesa fojo organizas la internacian Esperanto-laborbrigadon (IEL) ekde la 1-a ĝis la 26-a de aŭgusto 1988 j. Por detala informo bv. skribu al adreso: Bulgario, 5800 Pleven, str. „C. Cerkovski" 14 (laborbrigado 88).

F. Lo Jacomo kaj D. Blanke intervjuis Martinet

La mondkonata franca lingvisto André Martinet la 17-an de novembro 1987 akceptis en sia hejmo François Lo Jacomo kaj Detlev Blanke kaj respondis en duhora intervjuo iliajn demandojn pri problemoj de interlingvistiko kaj esperantologio. Oni planas broŝure eldoni la intervjuon, kiu estis ĝenerale favora por Esperanto.

Nova estraro de ĈEA

Dum la 5-a kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Olomouc (11. — 13. 9. 87) estis elektita nova estraro. La novaj ĉefaj funkciuloj estas:
Prezidanto: Ing. Petr Chrdle/prononcu Ĥdle
1-a vicprezidanto: Ing. Vlastimil Koĉvara
2-a vicprezidanto: Vera Podhradská
Sekretario: Karel Franc
Estraranoj: RNDr. Vlastimil Novobilský CSc., Inĝ. Margit Turková, Jiri Patera.

Amikeco, kiu donis fruktojn al ni post pli ol 50 jaroj

Antaŭ partopreno de la ĉijara UK en Varsovio mia japana amikino Hisako Sano vizitis min. Pasintjare ŝi multe esploris pri la iama japana esperantisto Eiichi Doi, kies tombo situas en malgranda loko Marbach apud Nossen. La nomon „Tombo de internacia amikeco" ŝi donis, ĉar tie ankaŭ ripozas la iama instruisto Johannes Schröder, kiu estis bona amiko de Eiichi. Nature mia amikino deziris viziti la tombon de tiuj ambaŭ amikoj kaj kune kun aliaj grupanoj kaj amiko el Riesa ni veturis je la 19a de julio 1987 al Marbach/Forsthaus. Tie jam atendis nin multe da geamikoj el Dresden, Leipzig, Roßwein kaj aliaj lokoj. Kia surprizo! Ankaŭ geamikoj Beau el Leipzig venis kun japana amikino, kiu ankaŭ loĝas proksime de Tokio!

Du gelernantoj el Marbach transdonis al ambaŭ japanaj gastoj florojn kiel bonvenigan saluton kaj gvidis nin al la tombejo. Tie ni metis niajn salutojn sur la tombon kaj pensis pri tiu sincera amikeco inter Eiichi Doi kaj Johannes Schröder. En la gastejo „Goldener Adler" (ora aglo) ni ĉiuj (45 personoj) bone tagmanĝis. Nia grupano Herbert Thiel rakontis detale pri la historio de la tombo. Poste Hisako Sano raportis pri siaj informpetoj kaj serĉesploroj en la rondo de esperantistoj kaj en jurnaloj kaj gazetoj, post miaj informoj. Komune ni vizitis ankoraŭ la parkon kaj ruinojn de la iama monaĥejo Alt-Zella kaj poste adiaŭis kaj forveturis. En nian grup-libron mia amikino skribis poste jenajn frazojn: „Kia surprizo kaj kia ĝojo! Tiom multaj esperantistoj kune kun mi vizitis „la tombon de internacia amikeco!" La semo, kiun s-ro Schröder kaj s-ro Doi semis antaŭ pli ol 50 jaroj, kreskis kaj donis frukton al ni esperantistoj germanaj kaj japanaj. Esperanto plue vivos kaj interligos multajn homojn en la mondo."

La 5an de aŭgusto denove okazis renkontiĝo kun japanaj samideanoj en Marbach. S-ino Yukiko Isobe, ĉefdirektorino de JEI (Japana Esperanto-Instituto en Tokio) vizitis nian landon post la UK en Varsovio kune kun 6 japanaj geamikoj. Post la vizito en Berlin kaj Leipzig ili deziris iri al la tombo en Marbach kaj renkontiĝi kun grupanoj en Meissen. Ni veturis al Marbach kaj kune kun geamikoj el Marbach, Dresden kaj Karl-Marx-Stadt atendis la japanajn gastojn. La direktoro de la lernejo bonvenigis ĉiujn gastojn kaj petis eniri kaj viziti tiun lernejon, en kiu instruisto Schröder siatempe instruis. Li informis pri la publika instruado en GDR kaj speciale en la lernejo de Marbach. Instruisto Heinz Heimann, kiu ankaŭ instruas Esperanton, tradukis por japanaj gastoj esperantlingven. Malonge ni ankaŭ interparolis pri la historio de la tombo kaj poste ni komune iris al la tombejo, kiu troviĝas apud de lernejo. Kiam ni metis niajn florsalutojn sur la tombon, ĉiuj japanaj gastoj kantis: „La luno super la ruino de kastelo." Kortuŝite ni aŭdis tiun kanton, kies tekston skribis la patro de Eiichi Doi. Poste la grupo veturis al Dresden por rigardi famajn vidindaĵojn. Feliĉe la venonta tago donis revidon en Meissen kaj la japanaj gastoj admiris dum montrado la laboron de la modelistoj kaj pentristoj kaj la diversecon de porcelanaĵoj en la porcelanmuzeo. Ankaŭ la kastelo „Albrechtsburg" tre interesis la gastojn. Granda surprizo por ĉiuj partoprenantoj estis, ke s-ro Böttcher el Casabra transdonis al la gastoj memfaritajn fotojn de la antaŭa tago en Marbach!

Jam mia amikino Hisako diris al mi, ke iama plej intima amiko de Eiichi ankaŭ planas viziti la tombon dum la monato aŭgusto kun filo. Do, je la 23a de aŭgusto ili vizitis min kaj ankaŭ ili ricevis en nia Porcelan-manufakturo specialan montradon. D-ro Onoda rakontas al mi, ke post la morto de Eiichi liaj amikoj fondis internacian societon de karpofiguraj flagrubandoj, kaj sendis ĉiujare flagrubandojn al eksterlandaj lernejoj. En la nomo de tiu societo „Koinobori" li donacis al mi du grandajn flagrubandojn.

Venontan tagon dum la vizito en Marbach la lernejo ankaŭ ricevis du karpofigurajn flagrubandojn, de tiu sama speco, kiun antaŭ pli ol 50 jaroj Eiichi Doi sendis al s-ro Schröder. Kvankam la vizito de d-ro Onoda daŭris nur 3 tagojn, li estis tre kontenta, ke finfine post multaj jaroj plenumiĝis lia plej granda deziro viziti la tombon de la plej amata amiko Eiichi.

Mi tre ĝojas, ke tiuj tri renkontiĝoj kun japanaj esperantistoj okazis en la jaro de centjara jubileo de Esperanto. Ili estas pruvo, ke la Esperanto-amikecoj travivas eĉ la morton. Certe novaj amikecaj rilatoj kun japanaj esperantistoj komenciĝos. Ankaŭ ili kontribuos al la konservado de la paco.

Marianne Dörner, Meißen

Ĉu vi volas korespondi?

Jen, skribu al kelkaj gazetoj, kiuj senpage publikigos vian koresponddeziron:

— der esperantist, Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin 1080, GDR

— Bulgara Esperantisto, p. k. 66, 1000 Sofia, Bulgario

— Esperantisto Slovaka, Stano Marĉek, Zvolenská 15, 036 01 Martin, ČSSR

— Pola Esperantisto, ul Jasna 6, 00-013 Warszawa, Pollando

— Starto, Jilská 10, 110 00 Praha, 1, ČSSR

— Budapeŝta Informilo, Pf. 193, 1368 Budapest, Hungario

— Hungara Vivo, Pf. 193, 1368 Budapest, Hungario

— Juna amiko, Pf. 193, 1368 Budapest, Hungario (nur por gejunuloj)

— El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

La 100-JARIĜO DE ESPERANTO SOLENE CELEBRITA EN HANOJO

La 16-an de aprilo 1987, Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio kunlige kun la Ŝtata Unesko-Komisiono de Vjetnamio organizis en Hanojo amasan renkontiĝon jubilee al la 100-jariĝo de Esperanto, responde al la Rezolucio de UNESKO koncerne tiun eventon. La sukcesplena aranĝo estas raportita de la Televido, la Radio, la Inform-agentejo kaj diversaj enlandaj gazetoj. Inaŭguris la jubileon profesoro Hô Tôn TRINH, direktoro de la Beletra Instituto kaj vicprezidanto de la Vjetnama UNESKO-Komisiono; li emfazis la taŭgecon de Esperanto por la kulturaj kaj sociaj rilatoj inter diversaj nacioj en la nuntempo kaj akcentis la gravecon de VPEA en la disvastigo de E. en nia lando serve al mondpaco kaj al la proksimiĝo de la mondaj popoloj. Sekve, la poeto DAO ANH KHA, prezidanto de VPEA faris prelegon, per kiu li traktis la problemon de Esperanto el vidpunktoj lingvistika kaj socihistoria, konsideris la komunikilon E. kiel integran parton de la nuntempa scienc-teknika revolucio, efikan ilon por la pacdefendo kaj unu el la faktoroj por la homara evoluado.

Enkadre de tiu jubileo, la plej granda tagjurnalo en la lando, „La Popolo", publikigis longan artikolon de DAO ANH KHA titolitan „Esperanto, komunikilo de la homaro". Klarigante la historian signifon de la Rezolucio de UNESKO koncerne Esperanton, la aŭtoro konkludis: „La aktuala procedo utiligi lingvojn ĉe UNO estas nur portempa kaj ne racia . . . Problemoj financa kaj teknika estos pli bone solvataj, se Esperanto estas utiligata kiel la sole internacia komunikilo. Cetere, pli grava estas tio, ke ĉe tia solvo ankoraŭ neniu povas antaŭe taksi kiom ĝi influos sur la disvolviĝoritmon de la sciencoj kaj tekniko, de la homgenta kulturo en estonto. Tio estas tute nova problemo, kiu metiĝas antaŭ la homaro."

DANG DINH DAM

En Vjetnamio Esperanto progresas. Unu el la multaj aktivuloj en Vjetnamio estas s-ro Ngô Chán Lij. Jen li prelegas pri la tutmonda Esperanto-movado dum la Zamenhofa tago 15. 12. 1987 en la Junulara Kulturdomo de urbo Hó-Chi-Minh.

NOVA FAKA SOCIETO: Historiistoj

En aprilo 1987 proksimume cent personoj ĉeestis kunvenon en Abergavenny, Kimrujo, por starigi Societon por Studo pri la Historio de Esperanto. Kiel indikas la titolo, la celo de la nove fondita societo estas la studado de la historio de Esperanto kaj ĝia parolantaro. Plua celo estas la eldonado de taŭga kaj regula revuo **Historiaj Studoj** pri tiu temo.

Dum la fonda kunveno oni diris, ke Esperanto atingis jarcenton de sia ekzistado dank' al la laboro de diversaj ordinaraj kaj neordinaraj homoj, pri kiuj ni ĝenerale scias malmulte.

En arĥivoj, bibliotekoj kaj privataj domoj tra la tuta mondo kuŝas kvanto de materialo uzinda por pli bone koni la originojn de la esperantistaro. La nova societo celas konstati, kie troviĝas taglibroj, protokollibroj kaj privataj leteroj de la frua epoko, kiuj helpos en la dokumentado de la historio de la lingvo.

Kvankam en Britujo okazis la fonda kunveno, la nova societo ne pensas pri Esperanto nur en nacia kadro. Male, la ĵus elektita komitato forte deziras kunlabori kun historiamantoj en aliaj landoj.

Elektiĝis al la komitato de la societo Amador Diaz (Prezidanto), Hilary Chapman (Sekretario), Kate Hall (Redaktoro de **Historiaj Studoj**), Eric Fowden (Kasisto), Marjorie Boulton, kaj Stanley Nisbet. (Adreso de la Sekretario: Bodfeio, 34 Llwyn Estyn, Deganwy, Conwy,Gwynedd LL31 9RA, Britujo).

Docentigo de d-ro Detlev Blanke

La ministro pri altlernejaj kaj faklernejaj aferoj de GDR la 1-an de februaro 1988 nomumis d-ron sc. Detlev Blanke „Honoraria docento por interlingvistiko en Humboldt-Universitato de Berlin". Per tio la fako interlingvistiko estas oficiale ligita al la sociscienca fakultato de la universitato. La docenteco ebligas certigi sisteman prelegadon kaj instruadon, stimuladon de diplomlaborajoj, doktorigaj disertacioj kaj de aliaj universitatnivelaj aktivecoj. Post la Eötvös Lorand-Universitato en Budapest la Humboldt-Universitato en Berlin estas la dua en la mondo, kiu enkondukis interlingvistikon en la rango de docenteco.
D-ro Blanke, kiu ekde la nomumiĝo ankaŭ apartenas al la altlerneja instruistaro de la universitato tamen restos sekciestro en Kulturligo, kiu plene subtenas lian novan sciencan agadsferon.

Helmar Frank:

Kiam Eo, kiam ILO?

Reago al la terminologia argumentado de Doktoro Detlev BLANKE

1. Enkonduke:

Per artikolo aperinta en „der esperantist" n-ro 139 (5/1986) kaj — mallongigite — en „Budapeŝta Informilo" n-ro 193 (1986/11) d-ro Detlev BLANKE pliprofundigis la diskuton pri la problemo, kiel nomi la lingvon iniciatitan antaŭ 100 jaroj de ZAMENHOF sub la aŭtora pseŭdonimo „D-ro Esperanto". Kvankam certe ne estas malsamopinio pri tio, ke multe pli gravas skribi kaj paroli e n ĉi tiu planlingvo ol skribi aŭ paroli p r i ĝi, kaj ke skribi kaj paroli p r i ĝi estas ankoraŭ multe pli grave ol skribi aŭ paroli pri la nura nomo de ĝi, samsistema prezentado de la argumentoj kaj kontraŭargumentoj fare de d-ro BLANKE estas nepra merito. Pro tio indas forigi la malmultajn malĝustaĵojn enŝovitajn. Por eviti troigon de la graveco de la nomo-problemo la reago devas esti konciza; kaj ĝi povas esti konciza, ĉar la argumentoj de d-ro BLANKE, per kiuj li pledas, ke oni ne profitu ankaŭ ekster la Esperanto-Movado de la „Principaro de Frostavallen" — kiu ofertas la alternativon „aŭ la internacia Lingvo aŭ Esperanto" —, ja nur estas argumentoj, konvinkantaj la aliajn, ĉar ne havantaj la devigan striktecon de pruvoj. Do certe restas kampo de ambaŭflanka pligrandigo de la argumentaro, sed pro koncizemo ĉi tiu reago ĉirilate nur malmulton kontribuu.

2. Ĝustigoj

2.1. Ne la „malgranda rondo de paderbornaj sciencistoj" havas la meriton esti la fonto de „la nova kutimo" uzi la originan, do unuan nomon „La Internacia Lingvo" de la ZAMENHOFa planlingvo anstataŭ ties posta, do dua nomo „Esperanto" por celi en sciencaj aŭ sciencorganizaj tekstoj nur la lingvon mem, sen la al ĝi ligita kulturo. Jam antaŭe tiel agis la organizantoj de la „Someraj Universitataj Kursoj (SUK) Lieĝo", kreaĵo de la Esperanto-Movado mem. Eble siatempe SUK nur senkonscie ekiris la taŭgan vojon, aŭ almenaŭ prisilentis la motivojn. Do nur la malkaŝa argumentado kaj la enkonduko de la mallongigo „ILo" eventuale estas originala ekpaŝo farita de paderborncentritaj rondoj.

2.2. Miskomperno estas, ke la citataj „negativaj efikoj" estis efikoj de la **evito** de la misuzo de la vorto „Esperanto": kontraŭe ili estis efiko aŭ celita efiko de la **fakta uzo** de ĉi tiu esprimo. Kaze de la Marilia-ekzemplo la aŭtoro mem estis parolinta en la koncernita federacia ministerio en Brasilia pri la subteno de la „Internacia Scienca Simpozio Marilia 1979". Pro tio ke en la sama urbo jam unu jaron antaŭe estis okazinta la unua latinamerika esperantista kongreso kun subvencio flanke de la Brazila registaro, oni argumentis, ke siatempe temis pri subteno de **ĝenerala kultura** okazintaĵo, tiel ke nun oni povas denove subvencii samurban kaj samlingvan kongreson, ĉar nun temos pri **speciale scienca** aranĝo, subvenciebla tial el alia parto de la buĝeto. Ne estis do dubo, ke la lingvo mem estis la sama, sed ke la uzado de la esprimoj „Internacia Scienca Simpozio" kaj „Internacia Lingvo" **evitante** la vorton „Esperanto" rajtigas apartigi la du petojn el la sama urbo. Pro la kontraŭ-interkonsenta uzado de la vorto „Esperanto" en la posta formala petskribo el Marilia tiu ĉi petskribo ne alvenis dum la buĝeta jaro en la manojn de la respondeca kaj informita oficisto, sed en la manojn de la respondeculo pri kulturaj aferoj; li miris, ĉar li jam zorgis pri la subvencio de la alispeca aranĝo samloka en la antaŭa jaro 1978 kaj ne povis denove helpi. Tiel ĝis hodiaŭ pluraj elstaraj sciencistoj eŭropaj kaj aziaj el la Esperanto-Movado mem kaj ankaŭ pli ol unu ekstermovada parolanto de ILo ne rericevis siajn elspezojn por la flugbileto. — En la paderborna ekzemplo la kontraŭuloj de la kibernetika pedagogio en la iama esplorcentro FEoLL (kiuj — estante kredeble eĉ nuraj ĵaluzuloj — per sia detruema agado intertempe eĉ kaŭzis la malfondon de ĉi tiu institucio per parlamenta decido) jam estis atakintaj per eksterfakaj argumentoj la klerigkibernetikan instituton antaŭ ol ĉi tiu ekinteresiĝis pri la Internacia Lingvo. Nun ili tuj ekprofitis de tiu ĉi ŝanĝo klopodante ridindigi la instituton kiel „Esperanto-Instituton". Kiam la instituto reagis per ĉesigo de la uzado de la vorto „Esperanto" kadre de sia laboro kompreneble la kontraŭuloj volis malpermesi tion, ĉar ili sciis, ke en la eksteraj decidrajtaj instancoj subuloj kutimas en akceptigcele submetitaj projektskizoj tutsimple reliefigi la vorton „Esperanto", tiel ke iliaj decidrajtaj superuloj sen plua legado rifuzas. Ĝojigas la aserto de d-ro BLANKE (5.1.1.), ke tia kutimo ekzistas nur en okcidentaj landoj.

2.3. La teksto de d-ro BLANKE erarige supozigas, ke la aŭtoro rekomendas traduki nacilingven la esprimon „La Internacia Lingvo", tiel esprimante „certan arogon pri rajto je sola reprezentado" (6.1.) — ekzistas aŭ ekzistis ja krom la ZAMENHOFa lingvo aliaj „internaciaj lingvoj", ekz. Interlingua kaj Volapük. Sed neniu el ili nomitas „Internacia Lingvo" — nomo, kiun oni laŭeble ne traduku en aliajn lingvojn! Nur en ILo mem oni do ne aŭdas (sed — pro la diferenco inter minuskloj kaj majuskloj — ja legante vidas!) diferencon inter „Internacia Lingvo" (= ILo) kaj „internacia lingvo" (= lingvo ne servanta al nacinivela sed al inter-nacia komunikado). La analogon oni ja spertas kaze de la vorto „volapük" de la SCHLEYERa planlingvo Volapük; la vorto signifas „mondlingvo", do elemento de klaso konsistanta ne nur el la lingvo de SCHLEYER. Same kiel oni ne tradukas la nomon Volapük oni ĉesu traduki la nomon Internacia Lingvo (aŭ, se nur tiel traduko estas facile evitebla, anstataŭu ĝin per la mallongigo „ILo") — kaj la homonimeco kaj ŝajna aroganteco malaperos!

3. Ekvilibrigo de polemiketaĵoj

3.1. Bone ja konas D-RO BLANKE la negativan afekcian kromefikon de la vorto „ŝanĝo" ĉe la esperantistoj, kiuj ja ĝis nun progresigis sian lingvon ne lastavice per sia rezistemo kontraŭ ŝanĝoj. La aserto (2.1.) ke la aŭtoro „enkondukis novan nomon por Esperanto: ‚Internacia Lingvo' . . .", la klaŭzo (5.1.)„klopodoj de FRANK ŝanĝi la nomon de Esperanto" kaj la ceterajo (5.1.3.), ke „al neniu venus la ideo ŝanĝi la nomon . . . ekz. de la germana lingvo" maltrankviligas, kvazaŭ la aŭtoro volus ŝanĝi la nomon de la ZAMENHOFa lingvo anstataŭ per laŭebla prisilentado kontraŭstari la malfeliĉan **ŝanĝon jam okazintan** en 1889 per la aldono de nova (kroma) signifo al la pseŭdonimo de ZAMENHOF. D-ro BLANKE mem citas (6.1.) la decidon de Frostavallen, kiu konservas la originan nomon kaj eĉ mencias ĝin en la unua pozicio de la ofertita alternativo.

3.2. Se iu objekto komence ricevis la nomon A kaj poste (ne anstataŭe, sed): krome ankaŭ la nomon B, tiu ĉi dua nomo evidente fariĝas kromnomo, se ne estas eksplicita interkonsento, ke ĝi ekde nun estu la preferenda nomo. Ne gravas, ĉu la tempa diferenco inter la du nomdonaj aktoj estas dudek aŭ „nur" du jaroj. Ĉu la eksplicita mencio de la jaro 1889 donu la eblon festi du jarojn post la Varsovia kongreso alian „Centjariĝon de Esperanto"? Se la (6.3.) asertitaj „nomŝanĝaj klopodoj de FRANK rekte konfliktas kun la ... celebrado de la jubileo de Esperanto" ĉijara, ĉar „oni ne jubileos ILon", tio logike nur estas komprenebla, se en la jubilea jaro ne estu jubileo de 100jara lingvo, sed de 100jara lingvo-nomo. Se vere tion celas la gvidantoj de la Esperanto-Movado, ili atendu ĝis 1889!

3.3. Se d-ro BLANKE ne protestas, ke ekde 1889 oni nomis la lingvon de „D-ro Esperanto" ankaŭ „Esperanto" — kaj iam poste enkondukis la mallongigon „Eo" aŭ eĉ „eo" —, tiam estas malfacile komprenebla la maltrankviliĝo pri la malpli revolucia enkonduko de la nura mallongigo ILo por la unua nomo de la ZAMENHOFa lingvo. Oni ne diru, ke la diferenco konsistas en tio, ke la eventuala eraro de la jaro 1889 jam „socie enradikiĝis" tiel, ke protestoj estus tro malfruaj. Kiu tiel argumentus, kapitaulacius antaŭ la bedaŭrinda „socia enradikiĝo" de la misuzado de la angla lingvo kiel surogata internacia lingvo, kaj samtempe instigus la apogantojn de novaj eventualaj eraroj plifortigi la klopodojn enradikigi ilin en la socion por „pravigi" ilin.

4. Aldonaj argumentoj

4.1. La insisto de la aŭtoro je la rajto paroli pri „La Internacia Lingvo" (ankaŭ kaj precipe ekster la Esperanto-Movado!) tute ne estas kontraŭ la lingvouzo de ZAMENHOF. Sajnas ke ZAMENHOF mem estis tre konscia pri la diferenco inter la de li enkondukita kaj uzata nomo „Internacia Lingvo" kaj la nocio „internacia lingvo". En la Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro (UEA/CED, Londono 1960) troviĝas citaĵoj el tekstoj de ZAMENHOF, el kiuj oni povas konkludi, ke li inversigis (almenaŭ kelkfoje) la sinsekvon al „lingvo internacia", kiam li skribis la vortojn minuskle, pensante al la nocio, sed uzis la sinsekvon „Internacia Lingvo" kun majuskloj por la nomo de la fare de li iniciatita internacia lingvo. Ekzemploj: „La Internacia Lingvo, same kiel ĉiu nacia, estas socia proprajo" (p. 30), „. . . teni la sorton de l'lingvo internacia en miaj manoj" (t. e. la sorto de la priparolita el la internaciaj lingvoj; p. 30), „. . . kian grandegan utilon alportus al la homaro lingvo internacia, kiu . . . povus . . ." (p. 35: evidente temas ĉi tie pri ajna internacia lingvo). Ke la „unua libro" de 1887 prezentas sur la titolpaĝo (vd. la foton en la Memorlibro!) la indikojn „D-RO ESPERANTO — INTERNACIA LINGVO — ANTAŬPAROLO KAJ PLENA LERNOLIBRO" ankaŭ indikas certagrade ke temas pri nomo, ĉar „internacia lingvo" sen la artikolo „la" estus ajna lingvo internacia, sed la unua libro ja celis enkonduki specifan tian lingvon sen uzi alian nomon. Anstataŭ „INTERNACIA LINGVO" skribi sur titolpaĝo aŭ kiel titolo de ĉapitro „Internacia Lingvo" tamen per si mem ne estus indiko, ke temas pri nomo, ĉar kelkfoje laŭ kutimo oni uzas majusklojn almenaŭ komencajn en titoloj. Tial la esprimo „Lingvo Internacia" aperanta en titolo ne signifus, ke ankaŭ temas pri nomo (krom la nomo Internacia Lingvo). — Se do la nomo „Internacia Lingvo" (en ĉi tiu sinsekvo de la nomopartoj) estis ripete uzata de ZAMENHOF mem (eĉ post la ekapero de la kroma nomo „Esperanto" por la sama lingvo), kaj se la Esperanto-Movado mem per la decido de Frostavallen proponas unualoke la saman nomon, kial ĝeni la interkonsenton trovitan ne nur kadre de la Akademio Internacia de la Sciencoj inter el- kaj ekstermovadecaj sciencistoj pri la modesta uzado de ĉi tiu origina nomo kun nova mallongigo „ILo"? Kial insisti je engluto ne nur de la lingvo sed ankaŭ de la tuta tradicio ligita al la dua nomo „Esperanto"? Kial al iu, kiu bezonas pordon, altrudi tutan domon?

4.2. En la scienco sinonimoj ne estas necesaj kaj homonimoj ofte konfuzigaj. La aŭtoro aplikis ĉi tiun principon al la ZAMENHOFa lingvo dum prelego en la konferenco „Socilingvistikaj Aspektoj de la Internacia Lingvo" de la Japana Esperanto-Instituo, okazinta de la 3-a ĝis la 5-a de aŭgusto 1986 en Tokio. Citaĵo el la prelego plipreciziĝu la starpunkton:

. . . La vorto „esperanto" estas unuavice kombinaĵo el la tri vortpartoj „esper", „ant" kaj „o" kaj signifas homon kiu esperas. Sed ĝi ankaŭ estas la pseŭdonimo de ZAMENHOF. Tio apenaŭ estas homonimeco, ĉar elektante tiun ĉi pseŭdonimon ZAMENHOF volis esprimi, ke li esperas. Veran homonimecon akceptis kelkajn jarojn poste la anoj de d-ro Esperanto, do la esperantistoj, kiam ili ekuzis apud la origina nomo de la planlingvo iniciatita de li, do apud la nomo „Internacia Lingvo", kiel samsignifan nomon, ankaŭ la vorton „Esperanto", kvankam ja certe nur homoj aŭ eventuale bestoj sed neniel lingvoj kapablas esperi. La vorto „Esperanto" do fariĝis ekzemplo kaj de sinonimeco kaj de homonimeco:

(1) sinonimeco (sama senco, diversaj esprimoj): Esperanto = Internacia Lingvo

(2) homonimeco (sama esprimo, diversaj sencoj): (D-ro) Esperanto (= [Dr.] Zamenhof) (Internacia Lingvo =) Esperanto. Sciencistoj emas en tia situacio per

difinoj plipreciziĝi la lingvon — almenaŭ por fakaj celoj. Ekzemple en la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino ni post longaj diskutoj sukcesis trovi la kompromison, ke ni uzu nur la esprimon „La Internacia Lingvo" por la ZAMENHOFa lingvo, kaj ne la vorton „Esperanto" kiel sinonimon. Kompreneble tio havas unu grandan malavantaĝon: „Esperanto" nur havas 4 silabojn, sed „Internacia Lingvo" 7 silabojn. En la epoko de la mallongigoj, kiuj abundas ĉefe en la faklingvoj, do konvenas mallongigi la nomon de la ĉefa oficiala lingvo de AIS al I. L. (2 silaboj, 4 signoj) aŭ eĉ al ILo (2 silaboj kun 3 signoj, nome granda I kaj granda L, sed malgranda o, tiel ke nek estas konfuzeblo — homonimeco — kun ilo = instrumento, nek kun la mallongigo ILO de la Internacia Laborista Organizo; tamen la aludo al „ilo" plaĉas al ni, ĉar la Internacia Lingvo por ni ja estas taŭga komunik-ilo).

5. Konklude:

Malgraŭ la aludita homonimeco inter la dua nomo de la lingvo iniciatita de ZAMENHOF kaj lia pseŭdonimo oni povas trovi interkonsenton kun d-ro BLANKE almenaŭ en tio, ke interne en la Esperanto-Movado eblas uzi alterne ambaŭ lingvonomojn, ĉar hodiaŭ ja ZAMENHOF ne plu bezonas pseŭdonimon, kaj en la Movado la vorto „Esperanto" estas oftege uzata, kaj preskaŭ ĉiam en la senco de la lingvonomo. Akceptebla estas ankaŭ la frazo (6.1.) de d-ro BLANKE: „En ekstermovadaj medioj, laŭ mia opinio ne estas konsilinde meti la alternativon." Ekster la movado ja ambaŭ nomoj kune multe malpli ofte aperas, tiel ke la ĝisnuna kutimo apenaŭ malhelpas racian terminologian normigon. La nura diferenco inter la opinioj de BLANKE kaj de la aŭtoro konsistas en tio,ke — ankaŭ evitante la alternan uzadon de la du sinonimoj — la aŭtoro konsilas pro siaj argumentoj, kiuj laŭ lia opinio estas pli gravaj ol la kontraŭargumentoj de d-ro BLANKE, ekster la Movado oni uzu por la nura lingvo ekskluzive la unuan nomon „Internacia Lingvo" aŭ la mallongigon „ILo".
Tiam oni povas — evitante sinonimecon — eĉ rezervi esprimon „Esperanto" por nomi la tutan fenomenon „Internacia Lingvo plus al ĝi ligita kulturo" kaj tiel alproksimiĝi al nuancita uzado de la vorto „Esperanto" tre disvastiĝinta en la Esperanto-Movado mem. Se „eo" estas jam rekomendita ISO-simbolo por la Internacia Lingvo, tio ne estas pli granda ĝeno ol la jam delonge uzata aŭtomobilsimbolo „CH", kiu ja ne estas mallongigo de nomo de Svislando en ajna tie oficiala lingvo.

Komento de D. Blanke

Por ne daŭrigi la polemikadon mi rezignas pri respondo. La legantoj mem pezu la argumentojn kaj formu al si vidpunkton. Mi petas pro tio relegi mian artikolon en „der esperantist" (5/86), kiu ŝajnas al mi ne refutita.

Franca nacia Esperanto-Muzeo

Fondiĝis la 16-an de majo 1987 en la franca urbo Gray „Nacia Esperanto-Muzeo de la franca esperantistaro". Ĝi disponas pri 10 salonoj, enhavas imponan kolekton da libroj, plurajn centojn da gazetkolektoj kaj multajn dokumentojn pri Esperanto.
La adreso: 19, Str. Victor-Hugo, F-70100 Gray, Francio

Materialoj serĉataj

Dum la periodo 1914 — 18 estis en vilaĝoj Assebroek-Steenbrugge (apud Brugge, Belgio) germana kazerno, de kie oni prizorgis transporton kaj provizadon de la militfronto. Por historia studo pri tiu periodo mi serĉas fotojn, leterojn, ktp. Ĉio resendota post konsultado. Kostoj kompensotaj. Skr. al Valentin Degrande, Astridlaan 398, B-8320 Brugge 4.

ITREE '87 en Radoŝov

De la 25-a ĝis 27-a de septembro 1987 okazis la konata Internacia Turista Renkontiĝo de Ercmontaraj Esperantistoj, ĉi-foje en la ĉeha urbo Radošov. Partoprenis ĉirkaŭ 50 personoj el ČSSR, GDR kaj Pollando.

INTERNACIA JUNULARA SEMAJNO (HUNGARIO) '88

Simile al la pasintjara aranĝo Hungara Esperanto-Junularo denove organizas internacian junularan ferian semajnon en sudhungarlanda urbo Szeged inter 10-16-a de julio 1988, en la semajno tuj antaŭ la IJK.
La programo antaŭvidas: noktan banejon, bivakfajrojn, ekskursojn kaj aliajn distrajn programojn, krome kelkajn seriozajn programojn, kiel medioprotektado, politika forumo pri Hungario ktp.
La organizantoj atendas ĉirkaŭ 200 esperantistojn. Dum la semajno oni loĝos en aparta ripozejo en 3-6-litaj ĉambroj, tuj apud la rivero Tisza (Tibisko). Eblas ankaŭ tendumi per propra tendo. La partoprenkotizo inkluzivas: loĝadon, manĝadon kaj programojn. Estas planata fakultativa, tuttaga ekskurso al Rumanio.
Junuloj el socialismaj landoj povas pagi surloke en forintoj, laŭ la kategorio de la aliĝilo, partoprenantoj el okcidentaj landoj pagu al UEA favore al la konto de HEJ (UEA kodo: heja-a).

Partoprenkotizoj:

kategorio I.
(loĝado en 3-4-litaj ĉambroj)
2.400,— Ft / 150,— gld
aliĝo post 1-a de majo:
2.800,— Ft / 175,— gld

kategorio II.
(loĝado en 4-6-litaj ĉambroj)
1.800,— Ft / 115,— gld
aliĝo post 1-a de majo:
2.200,— Ft / 140,— gld

kategorio III.
(loĝado en propraj tendoj)
1.300,— Ft / 80,— gld
aliĝo post 1-a de majo:
1.700,— Ft / 105,— gld

Pliaj informoj kaj aliĝiloj haveblas:
HUNGARA ESPERANTO-JUNULARO
Budapest
Pk. 193.
H-1368
HUNGARIO

Soveta Unio

11j. knabo dez. kor .tutmonde p. ĉ. t., kol. pm, bk: Oleg Tokun, **690039 Vladivostok,** ul. Enisejskaja 4, kv. 85

Lernantoj dez. kor.:

— Merle Harineem, **200029 Tallinn,** Mustamäe tee 84-128, 18j., pri muziko, naĝado,

— Kristiine Kuik, **200029 Tallinn,** Mustamäe tee 84-131, 14j., pri muziko, hundoj, Esperanto, naturo.

— Triin Sulger, **200033 Tallinn,** Tammsaare tee 127-54, 14j., pri sporto, gimnastiko, naturo,

— Mirjam Kangur, **200026 Tallinn,** Vilde tee 135-29, 14j., pri muziko, naturo, hundoj,

— Elin Nömmela, **20033 Tallinn,** Tammsaare tee 127-68, 13j., pri naturo, muziko,

— Jaana Avasalu, **203054 Laagri,** Redise 6-10, 17j. ,pri Esperanto, lingvoj, naturo,

— Agne Pruunlep, **203054 Laagri,** Redise 6-33, 17j. ,pri naturo, kol. bk,

— Ruve Osula, **200026 Tallinn,** Ehitajate tee 51-37, 13j., pri Esperanto, sporto, glubildoj, aŭtomobiloj,

— Toomas Liiv, **200026 Tallinn,** noudmiseni, 18j., pri Esperanto, medicino, ĵurnalismo, fotoarto.

22j. laboristo dez. kor. tutmonde: Viktor V. Podoljan, Mostootrjad 69, dom 86, kv. 1, **626 440 Nishnevartovsk-18,** obl. Tjumen

Jolanta Žirgutyte, str. Partizanu 162-42, **232000 Kaunas**/Litovio, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., 20j.

Zita Antanaityte, Šviesioji 7, **234313 Šlienava,** Kauno raj., 20j., dez. kor. tutmonde, p. ĉ. t.

Rima Medikaite, **234520 Kapsukas,** Pušinio 10 — 34, 17j., dez. kor. tutmonde, p. ĉ. t.

Galina Čuprova, **666 710 Kirensk,** Irkutskaja obl., ul. Partizanskaja 14-2, 28j. dez. kor. p. ĉ. t.

Helena Vasiljeva, Sovĥozo „Kučugurovskij" N-Devickij r-on, Voronejskaja obl. **396 884,** dez. kor. pri drogherboj, sporto, korpkulturo, jogo, kol. bk.

21j. studentino dez. kor. pri turismo, poezio, kol. bk: Vida Ruplyté, V. Juro 67-410, **233 031 Kaunas,** Litovio

19j. lernantino de muzlklernejo dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Ruth Saulski, Taara 44, **200 009 Tallinn,** Estonio

24j. komencantino dez. kor. tutmonde pri nacia kulturo, historio, fotografio, naturo, kol. bk, pm, kalendaretojn, esperantajojn: Nadejda Meteljova, **610 021 Kirov,** str. Vorovskogo d 102, kv. 144

26j. laboristo dez. kor. pri lingvoj, ŝtatoj, leĝoj: Aleksandr Talikov, **198 205 Leningrad — 205,** ul. Germana, d. 37, kv. 67

60 lernejanoj, 12-16j., estonaj geknaboj el du mezlernejoj dez. kor.:

200 029 Tallinn, 44. Keskkool, Esperanto-klasoj kaj **200 016 Tallinn,** 10. Keskkool, Esperanto-rondo

33j. fraŭlo interesiĝas pri viv- kaj pesmanieroj de eksterlandanoj:

Valerij Voronin, **690 022 Vladivostok,** Čapajev str. 12-902

Janis Jonans, **228 600 Valmiera-1,** P. K. 173, Latvio, 28j., dez. kor .p. ĉ. t., kol. bk, pm

Junaj geedzoj, Vilja (22j.) k. Juozas Abramavicius (23j.) dez. kor. tutmonde pri muziko, vivmaniero, kutimoj, kol. diskojn, bk, poŝkalendaretojn. Adreso: Topoliu 4-41, **234 580 Alytus-3,** Litovio

Egle Žilinskaite, **234 520 Kapsukas,** Pušinio 50-39, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t. (21j.)

25j. oficisto dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk, kalendaretojn:

Ivan Šerbin, ul. Lenina 161-10, **selo Roskošnol,** Lutuginskij raj., Vorošilovgradskaja obl.

25j. inĝeniero dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Jeremcov Aleksandr Mihajlovič, **360 021 Nalčiko,** str. Profsojuznaja 257

A. N. Lebedejev, Gorkovskaja oblast, Sachunskij raj., **n. Sjava,** ul. Čehova 1-3, dez. kor. pri muziko, libroj.

Edita Bagdonaite, **Anyksciai 234 930,** Kvarco 40, kaj Rasa Bagdonaite, **Anyksciai 234 930,** Kolukieciu, 30, (17j.), dez. kor. pri muziko

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080
Fernruf: 2 82 63 43
Verantw. Redakteur: Dr.sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Joachim Schulze. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16